


**Laocio**

**Dao De Jing**



laŭ Rikardo Vilhelmo

**Aŭtoro** Laocio

**Titolo** Dao De Jing

**Tradukis** Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser  
kaj Frank Vohla  
laŭ la germana traduko  
de Rikardo Vilhelmo:  
„TAO TE KING“

**Eldonis** Klubo Karapaco

**Korektis** Annieespera el Ĉinio

**Aranĝis** Frank Vohla  
Hans-Georg Kaiser

**Lasta  
redakto** 30.08.2016

# UNUA PARTO

## Taŭo

### 01

TAŬO, kiu estas elparolebla,  
ne estas la eterna TAŬO.

La nomo, kiu nomeblas,  
estas ne la eterna nomo.

„Neestado“ estas la komenco de Ĉielo kaj de Tero

„Estado“ estas la patrino de la unuopaj aĵoj.

Tial la direkto al la neestado kondukas

al la rigardado de la mirinda estaĵo,

la direkto al la estado,

al la rigardado de la spacaj limigitecoj.

Ambaŭ estas samaj laŭ la origino

kaj diversaj nur rilate la nomon.

Kiel unuecon oni nomas ĝin sekreto.

La eĉ pli profunda sekreto de la sekreto

estas la pordo, tra kiu aperas ĉiuj mirakloj.

# Rimarkoj pri 01

## Rimarkoj de Cezar

La aŭtoro Laocio, nomata ankaŭ Laŭzi, la oldulo, kies strebado, kiel diris ĉina historiisto pri li, estis kaŝi sin kaj resti sen nomo, naskiĝis fine de la sepa jarcento antaŭ Kristo. La unua alineo estas la teoria bazo de la tuta verko. Pensu ekz. pri la kontraŭdiroj spirito kaj materio, ĉielo kaj tero, penso kaj estado ĉe Spinoza, finco kaj senfinco, aŭ la Jin-Jang'-simbolon, kiu rgis por tio, ke mia traduko povis fariĝi pli bointerplektas pozitivan kaj negativan. Kaj fine, por pli bona kompreno, imagu la sekreton de la sekreto kiel cirklon, en kiu ankoraŭ nenio estas disigita, tiel kiel en la praa komenco.

Kiam mi komencis traduki, mi ne sciis, ke ĉino jam antaŭ mi tradukis la tekston en Esperanton. Don Harlow atentigis min pri tio, kaj tiel zone ol sen tiu komparteksto.

Laŭ mia impreso tiu traduko de Wang Chongfang estas tre fidinda. Li konscie rezignas pri la provo brili kiel lingva artisto kaj penas precize redoni la enhavon. Mi tradukis la

faman germanan tradukon de Rikardo Vilhelmo, Eugen Diederichs eldonejo Munkeno. Tiu parte ne tre fidinda traduko estas ankaŭ rilate la lingvon artaĵo. Do, kara leganto, se vi legas mian tradukon por ĝui la lingvon, uzu samtempe la pli sobran tradukon de Wang Chongfang, kaj tiel vi, kiel esperantisto havos du tekstojn, kiuj helpas al vi ensentiĝi en la verkon de granda filozofo, kiu estis por mi la plej interesa el ĉiuj, kiuj ekzistis ĝis nun. Interrete la traduko de Wang Chongfang momente ne troveblas. Sed ĝi mendeblas en retbutikoj. Ekzemple [ĉi tie](#).

Ta/o Θ La nedifinebla, nepersona principo, imanenta en la universo k ĝin movanta, karakterizata de la alterno de jino k jango. (PIV)

Por tiu ĉi termino s-ro Wang Chongfang uzas la formon „Taŭo“, ĉar li opinias, ke tiu pli taŭgas.

Jen lia opinio pri la vorto: „Mi preferas la formon „Taŭo“ al „Tao“, kvankam la dua estas akceptita de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, ĉar la unua formo estas fonetike pli proksima al la ĉina vorto „dao“. Se mi prenis la formon ‚Tao‘,

laŭ la Esperanta gramatiko ĝia radiko devus esti ,Ta-‘ kaj ,  
o“ estus ĝia finaĵo, tio evidente ne estus preferinda“.

## 02

Se surtere ĉiuj ekkonas la belan kiel belon,  
tiam per tio jam estas metita la malbelo.

Kiam surtere ĉiuj ekkonas la bonan kiel bonon,  
tiam per tio jam estas metita la nebono.

Estado kaj neestado reciproke estigas sin.

Malfacilo kaj facilo kompletigas sin reciproke.

Longo kaj mallongo formas sin reciproke.

Alto kaj malalto interkomunikas.

Voĉo kaj sono estas geo.

Antaŭe kaj poste sekvas unu la alian.

Tiel ankaŭ pri la saĝulo:

Li restadas en efikeco sen agado.

Li instruadas sen parolo.

Ĉiuj estaĵoj aperas,

kaj li ne rifuzas ilin.

Li estigas kaj ne posedas.

Li efikas kaj ne retenas.



Kiam la verko estas plenumita,  
li ne restados ĉe ĝi.  
Kaj ĝuste tial, ĉar li ne restadas,  
li restas neforlasita.

## **Rimarkoj pri 02**

### **Rimarkoj de Cezar**

La saĝulo, do la sanktulo, la profeto, tiu, kiu scias kaj kiu kapablas ĝuste agi aŭ ne agi.

La instruon de la „efikado sen agado“ oni komprenu en tiu senco, ke oni lasu efiki la kreaĵn fortojn mem, sen enmiksiĝi de ekstere. Tio kompreneble ne estas invito al pigrumado, sed por agi sen detrui, sen interrompi aŭ fuŝe ŝanĝi ion, do, sen enmiksiĝi en tion, kio bone iras per si mem. Tio estas tre grava penso de Laocio.

## 03

Oni ne honoru la kapablulojn. Tiel oni atingas, ke la popolo ne kverelas.

Oni ne ŝatu rarajn aĵojn,  
tiel oni atingas, ke la popolo ne ŝtelas.

Oni ne montru dezirindaĵojn,  
tiel oni atingas, ke la koro de la popolo ne konfuziĝas.

Tial la kapablulo regas tiel:

Li malplenigas iliajn korojn kaj plenigas iliajn stomakojn.

Li malfortigas iliajn volojn kaj plifortigas iliajn ostojn

kaj li atingas, ke la popolo restas sen scio

kaj sen deziroj,

kaj li zorgas por tio,

ke la sciantoj ne aŭdacos agi.

Li faras tion nefare,

tiel ĉio enordiĝas.

## **Rimarkoj pri 03**

### **Rimarko de Cezar**

Ke multe da sciado ankoraŭ ne saĝigas, estas penso, kiu por la greka filozofo Heraklito estis grava.

### **Rimarko de Wang Chonfang**

„Dum la Periodo de Militantaj Regnoj (475—221 a.K.), por kontentigi la deziron de la feŭda reganta klaso aboli la sistemon de la hereda regna oficisteco, la Leĝistoj kaj Moistoj proponis honoradon de kapabluloj, por ke nekapablaj aristokratoj povu esti degraditaj al nenobelego dum kapablaj nenobelaj povu fariĝi regnaj oficistoj.“

## 04

La TAŬO torentas ĉiam.

Sed ĝi neniam pleniĝas efikante.

Abismo ĝi estas, kiel la prapatro de ĉiuj aĵoj.

Ĝi mildigas ilian akrecon.

Ĝi solvas ilian konfuzon.

Ĝi limigas ilian brilon.

Ĝi unuiĝas kun ilia polvo.

Mistera ĝi estas kaj tamen reala.

Mi ne scias, kies filo ĝi estas.

Ĝi ŝajne estas pli frua ol Dio.

## **Rimarkoj pri 04**

### **Rimarko de Cezar**

Por tiuj, kiuj volas fari el Laocio religian instruiston, estu dirita, ke li mem videble ne tre ŝatis la ideon pri Dio. Por Laocio Dio estas ne pli ol aldonajo. Antaŭ Dio jam estis io! Tio estas fakte blafema. Min pensigis la lasta linio tuj pri „la praeksplozo“ el la kosmologio. Do ne Dio kreis la praeksplozon, sed la praeksplozo kreis ankaŭ Dion, laŭ Laocio! Nekredeble! Kiel li povis jam pensi tion! Ĉu ne mirinde, tiu penso, ses jarcentojn antaŭ Kristo?!

## 05

Ĉielo kaj Tero ne preferas iun.

Laŭ ili la homoj estas kiel pajlhundaj oferoj.

La saĝulo ne preferas iun.

Laŭ li la homoj estas kiel pajlhundaj oferoj.

La interspaco inter Ĉielo kaj Tero

estas kiel fluto

malplena kaj tamen ĝi ne kunfalas;

movate eliras pli kaj pli el ĝi.

Sed multaj vortoj elĉerpiĝos.

Pli bone estas konservi la internan.

## Rimarkoj pri 05

### Rimarkoj de Cezar

„Bonecon“ kaj „moralecon“, la plej altaj kategorioj de la fama Konfuceo, Laocio ne akceptas. La traduko „fluto“ anstataŭ „balgo-blovilo“ sekvas al Liang Ki Tŝau. Wang Chongfang, certe pli ĝuste, pro la sekvaj linioj, tradukis per „balgoblovilo“. (cez)

PIV: Konfuce/o. Ĉina filozofo, politikulo k edukisto (551—479 a.K.).



## 06

La spirito de la valo ne mortas,  
ĝi estas la mistera ino.

La pordego de la mistera ino  
estas la radiko de Ĉielo kaj Tero.

Seninterrompe kaj persiste  
ĝi efikas senpene.

## Rimarkoj pri 06

### Rimarko de Cezar

Valo en la senco de malplenaĵo. La spirito de la valo tamen ne mortas, ĉar ĝi estas nedisigeble ligita al la materio. Spirito kaj materio kiel unueco estas eternaj. La pordego en la ĉina traduko de Wang Chongfang estas la „Mistera Femalo“.

Mi uzas la vorton „ino“ ĉiam kiel mallongigitan version de „ulino“, ĉar mi tiel protestas feministe kontraŭ tio, ke „ino“ estas en Esperanto nur „vir-ino“, do kvazaŭ „ripo“ de Adamo, la unua homo laŭ Biblio. Mia plej preferata vorto por ino estus „ulino“, kiu estus certe multe pli taŭga ol „virino“, tamen ankaŭ „ulino“ estus iom tro longa por ĉiutaga uzo. Iuj opinias, ke la „Valo“ simbolas la ineksan organon kaj sekve „la Spirito de la Valo“ simbolas per fekundeco la TAŬ-on, kiu estas la origino de ĉiuj estaĵoj.

## 07

Ĉielo estas eterna kaj Tero daŭra.  
Ambaŭ estas daŭraj kaj eternaj;  
ĉar ili ne vivas por si mem,  
ili kapablas vivi eterne.

Tiel estas ankaŭ la saĝulo:  
Li metas sian memon malantaŭen  
kaj lia memo antaŭeniĝas.  
Li ne konservas sian memon;  
tamen lia memo restas konservita.  
Ĉu ne estas tiel?  
Ĉar li ne celas havi propran,  
lia propreco perfektigas.

## **Rimarkoj pri 07**

### **Rimarkoj de Cezar**

Laŭ Laocio oni atingas siajn personajn celojn ĝuste per tio, ke oni ne estas egoisto! Kiom vere! Plej fortaj estas ne la unuopaj egoismaj fortuloj, sed fortaj asocioj. Tian pensadon famigis ankaŭ la natursciencisto kaj anarkiisto Pjotr Kropotkin, kiu oponis la pensadon de la darvinistoj, ke la plej fortaj transvivas la aliajn. Laŭ li transvivas ĉiun alian tiuj, kiuj plej bone kunagadas en komunuma soci(et)o. Neegoista agado de unuopuloj estas fakte komunuma agado, kiu utilas al ĉiu komunumano.

## 08

La plej granda boneco estas kiel la akvo.

La boneco de la akvo estas

servi al ĉiuj estaĵoj sen konkuro.

Ĝi restadas en lokoj, kiujn malestimas ĉiuj homoj.

Tial ĝi estas proksima al la TAŬO.

Ĉe la loĝado montriĝas la boneco je la loko,

ĉe la pensado je la profundo,

ĉe la donacado je la amo,

ĉe la parolado je la vero,

ĉe la administrado je la ordo,

ĉe la agado je la kapablo,

ĉe la movado je la ĝusta tempo.

Kiu ne konkuras kun aliaj,

tiu ĝuste tial restas libera de misoj.

## **Rimarkoj pri 08**

### **Rimarkoj de Cezar**

La lasta frazo en alia germana traduko de la eldonejo Reclam, „Laudse Daudedsching“ de Ernst Schwarz tekstas tiel: „Nur tiu, kiu, kiel la akvo, kverelas kun neniu, estas sen sufero.“ Sed oni povus miskompreni tion!

### **Rimarko de Wang Chongfang**

„Venki malmolon per molo, retiriĝi por antaŭeniri kaj atingi sian celon per nekonkurado estas tri karakterizaĵoj de la pensmaniero de Laŭzi kaj la praktikado de lia penso.“

## 09

Voli firmteni ion kaj ĉe tio tro plenigi ĝin:  
tio ne valoras la penon.

Uzi ion kaj ĉe tio ĉiam teni akra ĝin:  
io tia ne konserveblas dum longa tempo.

Halon plenigitan per oro kaj juvelŝtonoj  
oni ne povas protekti.

Esti riĉa kaj nobla kaj aldone orgojla:  
Tio altiras per si mem la malfeliĉon.

Kiam la verko estas plenumita, tiam retiriĝu:  
tio estas TAŬO de Ĉielo.

## **Rimarkoj pri 09**

### **Rimarko de Wang Chongfang**

„En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi montras la malavantaĝojn de nekontenteco kaj troeco kaj rekomendas modestecon kaj cedemon. Laŭ li, oni devas kontentigi sin per sufiĉeco kaj ne serĉi troajn riĉecon kaj honoron kaj, por longe ĝui trankvilecon kaj feliĉon, oni devas sekvi la leĝon de la Ĉielo, t.e. retiriĝi tuj post la plenumo de granda laboro, same kiel oni ĝustatempe demetas vazon jam ĝisrande plenan.“



## 10

Ĉu vi povas formi vian animon tiel,  
ke ĝi ĉirkaŭprenas la unuecan sen disiĝo?  
Ĉu vi povas unuecigi vian forton  
kaj atingi softecon tian,  
ke vi fariĝas tia, kia infaneto?  
Ĉu vi povas purigi vian sekretan rigardadon tiel,  
ke ĝi fariĝas sen makuloj?  
Ĉu vi povas ami la homojn kaj administri la ŝtaton tiel,  
ke vi restas sen scio?  
Ĉu vi povas, kiam malfermiĝas la pordoj de Ĉielo,  
esti kiel kokino?  
Ĉu vi povas trapenetri per via interna klareco ĉion  
sen bezoni la agadon?  
Naski kaj nutri,  
naski kaj ne posedi,  
efiki kaj ne retenigi,  
pliigi kaj ne regi:

jen sekreta VIVO.

## **Rimarkoj pri 10**

### **Rimarkoj de Cezar**

„Kokino“ tradukis Wang Chongfang per „Femalo“, do per „Ino“, kaj „sekreta VIVO“ per „profunda VIRTO“. La ĉapitra traduko de Vilhelmo tre malsimilas al tiu de Wang Chongfang.

### **Rimarkoj de Wang Chongfang**

„La Libro de Laŭzi estas dividita en du partojn: Dao Jing (Klasikaĵon pri la Taŭo) kaj De Jing (Klasikaĵon pri la Virto). Kion do la Virto signifas en la libro?

En la ĉina lingvo la origina signifo de la vorto De estas ‚akiri‘, kaj poste, per sencoplivastigo, ĝi ricevis ankaŭ la signifon ‚virto‘. Laŭ ĉinaj antikvaj filozofoj, la propreco de ĉiu ekzistaĵo estas akirita el la origino de la mondo. En la filozofio de Laŭzi la Taŭo signifas la originon de la universo kaj la universalan principon, kaj la Virto nature signifas la econ de la konkreta estaĵo akiritan el la Taŭo. Kiel la aktiveco aŭ la funkcio de la Taŭo, la Virto troviĝas en ĉiuj

estaĵoj kaj estas la latentaj povo, kiu povas transformi, kiel ekzemple, la semon en arbon kun neniam peno de la flanko de la semo. La Virto do estas ankaŭ la manifestiĝo de la nevidebla Taŭo en la homaj aktivecoj kaj en la homa vivo, kaj estas konsiderata kiel la rimedo ebliganta al homoj atingi la Taŭon. Konkrete dirite, la Virto estas la Taŭo manifestiĝanta en la homaj kondutreguloj. Se oni sekvas tiujn regulojn, oni tiam vivas en harmonio kun la Taŭo, t.e. kun la fortoj de la naturo, kiuj ĉiaokaze estas nerezisteblaj. La rilato inter la Taŭo kaj la Virto estas kvazaŭ tiu inter korpo kaj ĝia funkcio. La Taŭo aludas naturan staton sen ajna signo de homa interveno, dum la Virto aludas la revenon al la natura stato kun homaj aktivecoj inkluzivitaj. Alivorte, kiam la metafizika Taŭo estas aplikata al la homa socia vivo, ĝiaj manifestiĝantaj katakterizaĵoj spertataj kaj sekvataj de la homoj estas rigardataj en la amplekso de la Virto. Laŭ La Libro de Laŭzi, la Virto, aŭ la Taŭo, manifestiĝas ĉefe en: 1) la sekvado de la leĝoj de la naturo kaj de la principo de „senagado“; 2) la malplenigo de sia menso kaj la kvietigo de sia koro; 3) la penado resti mola kaj malforta kaj fari nenian konkuradon.“

## **Rimarko de Cezar**

Por kompreni, kial Laocio malŝatas en la tuta verko tiom la sciadon, oni devas scii, ke Laocio faras ĉiam diferencon inter intuicia kaj diskursiva scioj. Kaj mi persone supozas, ke li jam pensis pri tio, ke la oficiala scio utilas kutime unuavice al la regantoj. Ankaŭ la „agado“ de Laocio laŭ mia opinio celas pli la oficialan kaj rutinan agadojn ol la individuan.

# 11

Tridek spokoj ĉirkaŭas naboron:

inter ili la malpleno ekestigas la uzeblecon de l' ĉaro.

Oni knedas argilon kaj formas el ĝi ujojn:

En ties malpleno ekestas la uzebleco de l' ujoj.

Oni faras pordojn kaj fenestrojn, por ke fariĝu ĉambreto:

En ties malplenoj ekestas la uzebleco de la ĉambreto.

Tial tio, kio ekzistas, servas la posedon.

Tio, kio ne ekzistas, servas la faradon.

# Rimarkoj pri 11

## Rimarkoj de Cezar

Tiel tradukis Wang Chongfang la du lastajn liniojn:

„Tial ni tiras avantaĝon el tio, kio ekzistas,  
Kaj uzas la avantaĝon per tio, kio ne ekzistas.

La ĉapitro entenas pure dialektikan pensadon! Rado estas rado ĝuste tial, ĉar ĝi uzas la malplenojn inter la spokoj por esti rado. Do, ne nur tio, kio ekzistas, utilas, ankaŭ tio, kio ne ekzistas.

Ekzemple la truoj en kribrilo, kion sprite rimarkis la poeto Ringelnatz en sia poemo: „Mi tiom amas vin“. Li volas esprimi, ke en amrilato plej gravas tiu, kiu malĉeestas, kiu postlasas en postrestinto kvazaŭ vakuan senton.

## **Joachim Ringelnatz**

### **Mi tiom amas vin**

Mi tiom amas vin!

Mi al vi, se vi ĝin bezonus,  
eĉ kahelon el mia forno  
donus.

Mi ne malicis al vi, hoj!

Min kaptas sento de trist'.  
Ĉe l' deklivoj de l' fervoj'  
lumas abunde genist'.

Jam for – bedaŭr'.

Mi vin ne forgesas,  
vojaĝas.  
Ĉio kun longa daŭr'  
eksaĝas.

La temp' sur voj'  
ĉiun belon negas.

Jen eĉ boj',  
la hund' ne legas,  
skribul' ne estas.



Pro dev' ni ne restas.

Mi ridas.

Plej grave estas je kribrilo

truoj je l' fin'.

Mi tiom amas vin.

*tradukis Cezar*

## 12

La kvin diversaj koloroj blindigas la homojn.

La kvin diversaj sonoj surdigas la homojn.

La kvin diversaj gustoj sentigas la langon de l' homoj.

Hastado kaj ĉasado frenezigas la korojn de l' homoj.

Raraj aĵoj konfuzas la vivon de l' homoj.

Tial la saĝulo zorgas por la stomako kaj ne por la okuloj.

Li forigas tion kaj prenas ĉi tion.

## Rimarkoj pri 12

### Rimarko de Cezar

Wang Chongfang tradukas por „hastado“: „ĉevalvetkuro“.  
Krome li tradukas: „La raraj valoraĵoj tentas al rabado kaj ŝtelado.“ En la ĉina originala teksto laŭ Anniespera „*chi cheng*“ signifas: 1) Kuregi sur ĉevalo 2) libera vagado/irado.

## 13

Favoro tiel hontigas kiel konsterno.

Honoro estas tiel granda malfeliĉo kiel esti persono.

Kion tio signifas: „Favoro estas hontiga kiel konsterno?“

Favoro estas humiliga.

Oni atingas ĝin kun konsterniĝo.

Oni perdas ĝin kun konsterniĝo.

Tio estas: „favoro estas tiel hontiga kiel konsterno.“

Kion tio signifas: „Honoro estas tiel granda malfeliĉo kiel esti persono?“

La kaŭzo, kial mi suferas grandan malfeliĉon, estas,  
ke mi estas persono.

Se mi ne estus persono,

kiu malbono tiukaze povus trafi min?

Tial: Kiu honoras per sia persono la mondon,  
al tiu oni povas konfidi la mondon.

Al tiu, kiu amas la mondon je si mem,  
oni konfide povas transdoni ĝin.

## **Rimarkoj pri 13**

### **Rimarko de Rikardo Vilhelmo**

Tiu alineo estas tekste tre damaĝita. Post la dua linio videble parto de malnova komento eniĝis la tekston. Ni uzis ĝian klarigon por la traduko de la du unuaj linioj. La fina frazo ripetiĝas en duobla versio.

Ke oni ne dependu de favoroj kaj honoroj de aliaj, estas grava afero por la memo de homo, sed tio ne signifas, ke oni vivu sola kaj sen amikoj kaj sen helpo de amikoj. Ĝi signifas, ke oni misfidu al ĉiu, kiu volas dependigi nin per favoroj kaj honoroj, per donacoj kaj postenoj.

### **Rimarkoj de Cezar**

La traduko de Wang Chongfang tiom grave deflankiĝas de la traduko de Rikardo Vilhelmo, ke mi prefere tute redonas ĝin ĉi tie por komparo:

„Favoro kaj malfavoro kaŭzas konsternon.

Granda malfeliĉo estas same grava, kiel nia korpo.

Kion do signifas, ke favoro kaj malfavoro kaŭzas

konsternon?

La favoro estas humiliga per si mem;

Ĝin ricevante kaj perdante

Oni same konsterniĝas, –

Jen kion signifas, ke favoro kaj malfavoro kaŭzas

konsternon.

Kion do signifas, ke granda malfeliĉo estas same grava,

kiel nia korpo?

La kaŭzo, kial granda malfeliĉo nin trafas,

Kuŝas en tio, ke ni havas la korpon.

Se ni ne havus la korpon,

Kia malfeliĉo povus fali sur nin?

Tial nur al tiu, kiu zorgas pri la aliaj, same kiel pri si

mem,

La mondo povas esti konfidita;

Kaj nur tiu, kiu amas la aliajn, same kiel sin mem,

Estas inda je la regado super ĝi.“

## 14

Oni rigardas ĝin kaj ĝin ne vidas:

Ĝia nomo estas Ĝerma.

Oni aŭskultas ĝin kaj ĝin ne aŭdas:

Ĝia nomo estas Fajna.

Oni kaptas ĝin, sed ĝin ne perceptas:

Ĝia nomo estas Malgranda.

Tiun triopon oni ne povas disigi,  
tial ili miksite formas tuton.

Ties supro ne estas hela,  
ĝia malsupro ne malhela.

Ĉar ĝi fontas sen interrompo,  
oni ne povas doni nomon al ĝi.

Ĝi reiras en la Neekzistantan.

Jen la senforma formo,  
la senaĵa bildo.

Jen la malhele kaosa.

Irante renkonte al ĝi, oni ne vidas ties aspekton,



sekvante ĝin, oni ne vidas ĝian dorsan flankon.

Se oni firmitenas la TAŬO-n de la praa tempo

por regi la nunan Estadon,

jen oni povas scii la praan komencon.

Tio estas la seninterrompa fadeno de l' TAŬO.

## **Rimarkoj pri 14**

### **Rimarkoj de Cezar**

La tri ecoj Ĝerma, Fajna kaj Malgranda celas ion, kio ne estas kaptebla per la limigitaj sensoj, do spiritan, subkonscian, sed ankaŭ materian tian, kia ne percepteblas de ni. Oni neniam forgesu, ke la fruaj filozofoj ne disigis la materion de la spirito, sed ili ankoraŭ komprenis ĝin kiel unuecon. TAŬO ne estas nur senco, kiel tradukis Vilhelmo ĝin erare, sed animita materio. La kvar lastaj frazoj sugestas, ke la pasinteco kaj la estanteco estas dekomence neinterrompeble kunigitaj. La TAŬO etendiĝas el la pasinteco ĝis la nuno. Se ni penetras en la pasintecon, ni povas kompreni la nunon. TAŬO estas nek nur la efiko de kaŭzoj nek nur filozofia penso, ĝi estas pli ol tio.

### **Rimarkoj de Anniespera**

„Pri la tri terminoj en via traduko: „Ĝerma“, „Fajna“ kaj „Malgrando“ mi leĝis artikolojn ĉine verkitajn, preskaŭ ĉiuj konservas ties antikvajn esprimojn, t.e. „Yi“, „Xi“ kaj „Wei“;

kaj eĉ s-ro Wang Chongfang tradukis ilin nur per ties sencoj, t.e. „Nevidebla“, „Neaŭdebla“ kaj „Nepalpebla“. La precizan nomon oni ja ne facile povas akiri.“

## 15

Tiuj, kiuj en praaj tempoj estis kapablaj majstroj,  
estis en kaŝinteco ligitaj kun la nevideblaj fortoj.  
Tiom profundaj ili estis, ke oni ne povas koni ilin.  
Ĉar oni ne povas koni ilin,  
tial oni povas priskribi ilian aspekton nur pene.  
Ili estis hezitemaj kiel iu, kiu travadas en vintro riveron,  
memgardemaj kiel iu, kiu timas je ĉiu flanko najbarojn,  
diskretaj kiel gastoj,  
disiĝanta kiel glacio degelanta,  
simplaj kiel neprilaborita materio;  
vaste malplenaj ili estis kiel la valo,  
netravideblaj ili estis kiel la malklaro.  
Kiu (kiel ili) kapablas klarigi la malklaron kviete?  
Kiu kapablas krei (kiel ili) je daŭro la kvieton?  
Tiu, kiu konservas la TAŬO-n,  
ne avidas la plenan.  
Nur tial, ĉar li ne avidas la plenan,

li povas esti sengrava,  
eviti la novan  
kaj atingi la perfektecon.

## **Rimarkoj pri 15**

### **Rimarkoj de Anniespera**

En la originala teksto la „*Bi Er Xin Cheng*“ eble estis miskomprenita de Rikardo Vilhelmo. „*Xin Cheng*“ signifas novigon. Jen la traduko de s-ro Wang Chongfang: „Li povas konstante renovigi la malnovon.“

### **Rimarko de Cezar**

La strebado vivi en kaŝinteco estas la preciza malo de la nuna kutima avido je honoroj kaj gloro. Min tia hezitema „anonima“ vivstilo ĉiam denove memoras pri mia avino, kiu nur milde ridetis, kiam mi kiel infano provis fanfaroni al ŝi pri miaj „grandaj kaj gloraj agoj“.

Rikardo Vilhelmo rimarkas, ke vivi kaŝite apartenas al la esenco de mistikulo. Ĉe la verkisto B.Traven tio fariĝis preskaŭ manio. Kelkaj tekstpartoj de B.Traven evidentigas, ke li bone studis Laocion. (cez)

## 16

Kreu malplenon ĝis la ekstremo!  
Konservu la kvieton ĝis la plejpleno!  
Ĉiuj estaĵoj tiukaze samtempe leviĝu.  
Mi rigardas kiel ili turnas sin.  
La aĵoj, la kompleta kvanto,  
ĉiu aĵo el ili revenas al sia radiko.  
Reveno al la radiko estas kvieto.  
Kvieto estas turnado al la destino.  
Turnado al la destino estas la eterneco.  
Ekkono de la eterno estas la klaro.  
Se oni ne ekkonas la eternecon,  
oni konfuziĝas kaj ekpekas.  
Se oni ekkonas la eternecon,  
oni fariĝas tolerema.  
Pacienco kondukas al justeco.  
Justeco kondukas al regado.  
Regado kondukas al Ĉielo.

Ĉielo kondukas al TAŬO.

TAŬO kondukas al la daŭro.

Tiel oni ne venas en danĝeron dum sia tuta vivo.



## **Rimarkoj pri 16**

### **Rimarkoj de Cezar**

La „regado“ de Rikardo Vilhelmo tute kontraŭstaras al la evidenta neregemo de Laocio. Wang Chongfang tradukis: „Agante kiel reĝo li estas en akordo kun la naturo“. Alia germana fidinda tradukisto de la Dao De Jing, Ernst Schwartz tradukas: „kiu apartenas al ĉiuj estas reĝa“ (ĉe Ernst Schwartz). B.Traven iam skribis, ke li volas esti sia propra reĝo, do regi sin mem. Memregado kompreneble estas tute alia afero ol regadi ion aŭ iujn.

## 17

Se regas bonega reganto,  
la popolo apenaŭ scias, ke li ĉeestas.  
Malpli bonan reganton oni amas kaj laŭdas.  
Eĉ malpli bonan oni timas.  
Kaj la malplej bonan oni malestimas.  
Kiel pripenseme oni devas esti rilate al siaj vortoj!  
La taskoj estas plenumitaj, se la negocoj deruliĝas  
normale,  
jen la homoj ĉiuj pensas:  
„Ni estas liberaj.“

## Rimarkoj pri 17

### Rimarkoj de Cezar

Laŭ Wang Chongfang Laocio pensas, ke senagado estas la plej bona principo por reganto. Regantojn, kiuj agas arbitre, Laocio evidente tute ne ŝatas. Sed registaro, kiu ŝajne ne agas, estas en vero superflua. Ĉu Laocio do estas la unua filozofo, kiu konscie volis forigi la ŝtaton? Certe ne, tiu konkludo estus troigo. Anniespera skribis al mi, ke senagado ĉe Laocio ne signifas ne fari ion, do, la registaro ĉe Laocio ne estas simple superflua, sed ĝi ne agu kontraŭ la TAŬO. Laocio vere ne volis forigi la registarojn, nur plibonigi ilin, tiel, kiel la prusa ministro Vilhelmo Humboldt, kiu volis, ke ĉiu superflua agado de ŝtato, kiu malhelpas progresojn, estu finita. Sed li konkludis aldone konsekvence, ke la ideala ŝtato estus fine tiu ŝtato, kiu progresas tute sen registaro.

Nun ankoraŭ por komparo kelkaj frazoj de la traduko de Wang Chongfang, kiuj montras laŭ Anniespera, ke en la traduko de R. Vilhelmo verŝajne frazoj perdiĝis:

„Tiuj, kiuj ne meritas la fidon de la popolo,  
Ne povas esti fidataj de ĝi.  
Senokupaj kaj senzorgaj, la plej bonaj regantoj malofte  
donas ordonojn.“

## **Rimarko de Rikardo Vilhelmo pri la dua parto de la ĉapitro**

„Bonvolu kompari al la rava popolkanto, kiun oni kantis laŭdire sub la imperiestro Yaŭ:

„Suno leviĝas, kaj mi iras al la laboro.

Suno malleviĝas kaj mi iras por dormi.

Mi fosas puton kaj trinkas.

Mi plugas kampon kaj manĝas.

La imperiestro - kion tiu donas al mi?

(Ĉion tion mi havas ne dank' al la imperiestro, sed pro mia propra laboro.)“

## **Rimarko de Cezar**

Anniespera trovis tiun kanteton en la ĉina lingvo kaj tradukis la enhavon por ni. Ŝi skribis al mi: „La rava popolkanto“ menciita de Rikardo Vilhelmo, estas titolita „*Ji Rang Ge*“ (fonetike).

Nun mi provas esprimi ĝin en Esperanto“:

## **Kanto pri la frapado de la tero**

„Kiam la suno leviĝas, mi eklaboras,  
kaj kiam la suno subiras, mi ekripozas.  
Mi fosas puton por trinki kaj plugas kampon por manĝi.  
Al kio la Di-potenco do servu al mi!“

## 18

Se la granda TAŬO pereas,  
ekestas moralo kaj devo.

Se leviĝas prudento kaj sciado,  
ekzistas la plej grandaj mensogoj.

Se la parencoj malunuiĝas,  
ekzistas la infandevio kaj la amo.

Se la ŝtatoj konfuziĝas,  
ekzistas la fidelaj oficistoj.

## Rimarkoj pri 18

### Rimarkoj de Cezar

Tie, kie oni krias plej laŭte pri iu abstrakta libero, estas ne tute hazarde malplej da libero. Usono, (ne Ĉinio!) havas momente la plej multajn prizonojn, sed la plej grandan diinan skulpturon de l' libero. Kie oni plej multe parolas pri moralo, virto kaj justo, tie tiuj kompreneble plej mankas. Ankaŭ Marks iam laŭsence atentigis pri tio, ke li tute ne celas justan socion, sed socion, en kiu neniu plu parolos pri justeco, ĉar ne plu estos juĝistoj kaj advokatoj kaj juĝejoj ktp... Eblas, ke li ĉe tio pensis pri la supra ĉapitro de Laocio.

Min plej fascinas, ke moralo por Laocio en la plej bona kazo estas lambastono, sed ne plu. Ne per tio, ke ni obeas al iu moralo, ni liberigas nin, sed per tio, ke ni superfluigas ĝin, ĉar ni forigas la kaŭzojn, kiuj necesigas moralon. Kia granda penso de Laocio, ĉu ne?

Mi aldonas ankoraŭ tion: Ne per tio, ke ni ĵetas homojn en prizonojn, ni plibonigas ilin, sed per tio, ke ni superfluigas



prizonojn.

## 19

Demetu la sanktecon, forĵetu la sciadon,  
tiel la popolo gajnos centope.

Demetu la moralecon, forĵetu la devon,  
tiukaze la popolo reiros al infaneca devo kaj amo.

Demetu la lertecon, forĵetu la gajnon,  
tiukaze ŝtelistoj kaj rabistoj ne plu ekzistos.

Pri tiuj tri aferoj  
la bela ŝajno ne sufiĉas.

Tial zorgu por tio, ke la homoj povu teni sin je io.

Montru simplecon, firmtenu la honestecon!

Malpliigu kaj la egoismon kaj la avidon!

Ĉesigu la erudicion!

Tiel vi liberigos vin de zorgoj.

## **Rimarkoj pri 19**

### **Rimarko de Cezar**

Edukito en landoj, kie la scio estas privilegio de malmultaj, estas vole-nevole privilegiito. Ke tiujn privilegiojn ebligas ĝuste tiuj, kiuj neniam vidis universitaton de interne, estas maljusta afero. Tia scio akirita koste de aliaj, estas dubinda.

## 20

Ĉu inter „certe“ kaj „tute certe“:  
efektive estas diferenco?

Ĉu inter „bono“ kaj „malbono“  
efektive estas diferenco?

Kion la homoj honoras, tion oni devas honori.

Ve, soleco, kiom longtempe vi daŭros?

Ĉiuj homoj estas tiel brilaj,  
kvazaŭ oni irus al granda festoferado.

Kvazaŭ ili grimpus printempe sur la turojn.

Nur mi estas hezitema, al mi ankoraŭ ne aperis signo,  
kvazaŭ kiel suĉinfano, kiu ankoraŭ ne povas ridi,  
maltrankvile, ĉirkaŭpelate, kvazaŭ mi ne havus  
hejmlandon.

Ĉiuj homoj havas abundon;  
nur mi estas kvazaŭ forgesita.

Mi havas la koron de ŝtipkapulo, tre konfuzan kaj  
malhelan.

La laŭmondaj homoj estas helaj, aĥ, tre helaj;  
Nur mi estas kvazaŭ malklara.

La laŭmondaj homoj estas prudentaj, aĥ, tre prudentaj;  
Nur mi estas kvazaŭ fermita en min mem,  
maltrankvila, aĥ, kiel la maro,  
kirliĝanta, aĥ, sen interrompo.

Ĉiuj homoj havas siajn celojn;  
nur mi estas vagemaj kiel almozetanto.

Nur mi estas alia ol la homoj:  
Sed mi rigardas tion valora  
serĉi nutraĵon ĉe la patrino.

## Rimarkoj pri 20

### Rimarko de Cezar

Rikardo Vilhelmo atentigis nin pri tio, ke la signo estas la orakolo, kiu antaŭ ĉiu grava entrepreno estis pridemandata (en la malnova ĉina tempo per karapacoj, kiuj estis ekbruligitaj kaj per kies ŝiraĵoj oni legis la respondon).

El la kriza sento de alieco de individuo inter la aliaj homoj ekestis en la monda literaturo multaj famaj verkoj. Ekzemple Faŭsto de Goeto. Pli poste por ekzemplo la ekzistencialismaj libroj kaj teatraĵoj de Sarte aŭ la romanoj kaj rakontoj de Ernest Hemingway, ĉiuj ĉi verkistoj laŭ mia opinio tre bone priskribis tiun solecosenton de individuo en la homaro, kiu nun jam preskaŭ tute estas disfalinta en homatomojn.

En la originala teksto Laocio uzis tiun ĉi vorton:

„wei“ (fonetike) laŭ Anniespera signifas „timi“ Legu pri tio ankaŭ ĉe s-ro Wang Chongfang mem: „Tio, kion aliaj timas, ne povas ne esti timata.“ La patrino en la lasta frazo de la

ĉapitro estas ĉe Wang Chongfang la TAŬO.

## 21

La enhavo de l' granda VIVO  
sekvas tute la TAŬO-n.

La TAŬO estigas la aĵojn,  
tiel kaose, tiel malhele.

Kaosaj, malhelaj  
estas en ĝi la bildoj.

Malhelaj, kaosaj  
estas en ĝi la aĵoj.

Neesploreble profunda  
estas en ĝi la semo.

Tiu semo estas tute vera.

En ĝi estas fidindeco.

Ekde praaj tempoj ĝis hodiaŭ  
la nomoj ne estas malhaveblaj  
por superrigardi ĉiujn aĵojn.

El kio mi scias la manieron de ĉiuj aĵoj?

Ĝuste el ili mem.



## Rimarkoj pri 21

### Rimarko de Anniespera

En la originala teksto estis uzata la vorto „*Jing*“ (fonetike), kiu signifas ofte „*Jing Hua*“ (fonetike), t.e. esenco, sed ne „*Jing Zi*“ (fonetike), t.e. „Semo“.

Vd. pri tiu tekstparto ankaŭ Wang Chongfang:

„Tamen en ĝi estas tenata la subtila esenco.

La esenco estas tre konkreta,

Kaj en ĝi estas latentia io vera.“

## 22

Tio, kio estas duona, fariĝos tuta.

Tio, kio estas kurba, fariĝos rekta.

Tio, kio estas malplena, fariĝos plena.

Tio, kio estas malnova, fariĝos nova.

Tiu, kiu havas malmulton, ricevos ion.

Tiu, kiu havas multon, konfuziĝos.

Tiel estas ankaŭ pri la saĝulo:

Liaj konsideroj ampleksas la tuton  
kaj estas imitinda ekzemplo.

Li ne volas mem brili,  
tial li estas lumigata.

Li ne volas mem esti elstara,  
tial li fariĝas elstara.

Li ne gloras sin mem,  
tial li plenumas verkojn.

Li atentigas ne mem pri si,  
tial li estas range levata.

Kun tiu, kiu ne kverelas,  
ja neni en la mondo povas kvereli.  
Tio, kion diras la maljunaj,  
ke el duona fariĝu plena,  
efektive estas ne nur vortoj.  
Tio inkludas ĉiun veran perfektecon.

## Rimarkoj pri 22

### Rimarkoj de Cezar

Vilhelmo mencias, ke la unua verslinio estas kvazaŭ metaforo pri Luno, la dua pri raŭpo aŭ ŝnuro, la tria pri kavetaĵo en la tero, kiu plenigas sin per akvo, kaj la kvara pri la folioj de arbo. Mi konfesas, ke tiu klarigo ne estas tre konvinka por mi.

Anniespera atentigis nin, ke la ĉina vorto „*zheng*“ (fonetike) signifas „*jing zheng*“ (fonetike), t.e. „konkuri“, sed ne „*zheng chao*“ (fonetike), t.e. „kvereli.“

La traduko de Wang Chongfang estas sendube multe pli bona. Tial mi citas lian ĉapitron 22:

„Estu cedema, kaj vi konservos vin tuta;

Estu fleksebla, kaj vi estos rekta;

Estu malplena, kaj vi fariĝos plena;

Estu kaduka, kaj vi renoviĝos;

Prenu malmulton, kaj vi ricevos;

Havu multon, kaj vi konfuziĝos.“

Tial la Saĝulo tenas sin je la Praa Unuo, la TAŬO,  
Kaj uzas ĝin kiel la kriterion por juĝi ĉion sub la Ĉielo.  
Estante neelmontriĝema, Li havas saĝon brilan;  
Ne konsiderante sin ĉiam prava, Li estas prudenta;  
Ne farante fanfaronojn, Li estas merita;  
Ne fierante pri si mem, Li estas eminenta.  
Ĝuste, ĉar Li ne konkuras,  
Neniu en la mondo povas konkuri kun Li.  
Kiel do povus esti malplena frazo la antikva popoldiro:  
Estu cedema, kaj vi konservos vin tuta.  
Tenante sin je la Taŭo, oni ja povas konservi sin bone.“

## 23

Faru rara la vortojn,  
tiukaze ĉio iros per si mem.

Kirloŝtormo daŭras eĉ ne dum tuta mateno.

Torenta pluvoverŝo eĉ ne tagon.

Kaj kiu efektivigas ilin?

Ĉielo kaj Tero.

Do, tion, kion eĉ Ĉielo kaj Tero ne kapablas daŭrigi,  
kiel kapablu tion, eĉ malpli, la homo?

Tial: Se vi iras al via laboro, iru kun TAŬO,  
tiel vi identiĝos kun tiuj, kiuj havas TAŬO-n, rilate al TAŬO,  
kun tiuj, kiuj havas VIVON, vi identiĝos rilate VIVON.

kun tiuj, kiuj estas povraj, vi identiĝos rilate la povrecon.

Se vi identiĝas kun ili rilate TAŬO-n,  
tiukaze tiuj, kiuj havas TAŬO-n,  
ĝoje iros renkonte al vi.

Se vi identiĝas kun ili rilate VIVON,  
tiukaze tiuj, kiuj havas VIVON,

ĝoje iros renkonte al vi.

Se vi identiĝas kun ili rilate ties povrecon,

tiukaze tiuj, kiuj estas povraj, ĝoje iros renkonte al vi.

Sed tie, kie la kredo ne estas sufiĉe forta,

oni ne trovas kredon.

## **Rimarkoj pri 23**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Wang Bi laŭ Vilhelmo diris: „La saĝulo povas elteni ĉion kaj identiĝi kun ĉio - do ankaŭ kun la perdo, la povreco.“

### **Rimarkoj de Chongfang**

„En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi pritraktas la principon de sia Taŭo kaj la manieron ĝin posedi. Se oni kredas je ĝi, oni ĝin akiras. Se ne, oni ĝin perdas. Li ankaŭ emfazas la gravecon de fido, kiam li finas tiun ĉi ĉapitron, dirante: „Nur kiam la reganto ne havas sufiĉan fidecon, la popolo lin ne fidas.“

„Laŭ Laŭzi la kaŭzo, kial la ventego ne daŭras unu tutan matenon, estas atribuita al la leĝoj de la Ĉielo kaj la Tero, t.e. al la leĝoj de la naturo. Per tio li montras al ni, ke la homo devas sekvi en siaj kondutmanieroj la leĝojn de la naturo, ĉar, se la naturaj fenomenoj estas ŝuldataj al la leĝoj de la naturo, kiel do la homo ne devus ilin sekvi? Se eĉ la forto de la Ĉielo kaj la Tero ne povas longe daŭri, kiel do povus longe daŭri la homa forto kaj eĉ la honoro, famo, rango, profito



ktp? Kaj kiel do estas necese, ke oni energie ĉasu honoron, famon kaj profiton kontraŭ sia konscienco?“.

## 24

Tiu, kiu staras sur la piedfingroj,  
ne staras firme.

Tiu, kiu iras per disetenditaj gamboj,  
ne sukcesas antaŭeniĝi.

Kiu mem volas brili,  
ne estas lumigata.

Kiu mem volas esti grava,  
ne fariĝas grandioza.

Kiu mem laŭdas sin,  
ne plenumas verkojn.

Kiu mem elstarigas sin,  
ne estas levata.

Li estas por TAŬO kiel kuireja rubo aŭ pusoŝvelaĵo.

Kaj ankaŭ la estaĵoj ĉiuj malamas lin.

Tial: Kiu havas TAŬO-n,  
ne restadas ĉe tio.

## Rimarkoj pri 24

### Rimarkoj de Cezar

Pensante dialektike, oni ĉeokaze devas retiriĝi por antaŭeniĝi. Tion mi ofte spertis en mia vivo, ekzemple kiel kulturfunkciulo en pasinta vivo en la tielnomata GDR; tiu, kiu staras tro longe en la lumo de publika vivo, kutime, sed ne devige, perdas sin mem, ofte kreas nenion plu, fariĝas burokrato, vanta ventfarulo, fine nur ombro de sia propra potencialo, aŭ eĉ pli draste dirate, kvazaŭ kuireja rubo aŭ pusotubero. Interese estas, ke B.Traven en sia romano "La Mortula Ŝipo" nomas la kapitalismon: "pesttubero de la homaro." Fortaj influoj fare de Laocio ankaŭ en aliaj verkoj de B.Traven konstatablas, kaj en la verko entute ekkoneblas. Certe tio estas sekvo de la traduko de Rikardo Vilhelmo, kiun tiu publikis unufoje en la jaro 1911, kaj kiu poste estis tradukita ankaŭ en multajn aliajn lingvojn.

Ankaŭ en Esperantio mi faris la sperton, ke propra elstarigo neniam kondukas al elstareco, sed tute male al malŝatateco. La ŝafgregoj ne ŝatas la nigran ŝafon kaj la konsciaj

individuoj ne ŝatas la „viron de la amaso“, kiel Edgar Poe nomis tiajn ulojn.

## 25

Ekzistas io, kio estas sen diferenciĝo perfektigita.

Antaŭ ol estis Ĉielo kaj la tero, ĝi jam estis,

tiel kvieta, tiel sola.

Sole ĝi staras kaj ne ŝanĝiĝas.

En cirklo ĝi iradas kaj ne endanĝerigas sin.

Oni povas nomi ĝin la patrino de l' mondo.

Mi ne scias ĝian nomon.

Mi nomas ĝin TAŬO.

Pene donante nomon al ĝi,

mi nomas ĝin granda.

Granda, tio signifas ĉiam moviĝanta.

Ĉiam moviĝanta, tio signifas foran.

Foran, tio signifas revenantan.

Tiel TAŬO estas granda, Ĉielo granda, Tero granda,

kaj ankaŭ la homo granda.

Kvar grandaĵoj estas en la spaco,

kaj la homo estas unu el ili.

La homo sekvas al la tero.

Tero sekvas al la Cielo.

Ĉielo sekvas al TAŬO.

TAŬO sekvas sin mem.

## **Rimarkoj pri 25**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Pri la vorto „endanĝerigas“ (fonetike ĉinlingve *dai*) rimarkindas, ke unu el la signifoj de la vorto nuntempe ja estas „danĝera“, sed en la verkita tempo, temas pri „mallaborema / maldiligenta“.

Vilhelmo:

„Oni povas nomi ĝin la patrino de l' mondo.

Vd. el Wang Chongfang:

„Ĝi povas esti rigardata kiel la Patrino de ĉio sub la Ĉielo.“

### **Rimarkoj de Wang Chongfang**

„Tio ĉi estas unu el la plej gravaj ĉapitroj de la filozofia verko de Laŭzi. Ĝi priskribas la Taŭon kiel ion estiĝintan jam antaŭ ol la Ĉielo kaj la Tero kaj ĉiuj aliaj ekzistaĵoj. La Taŭo estas transcenda, ĉar ĝi estas trans la homaj sensoj. Ĝi estas movopova kaj ĉiam moviĝas. En la universo ekzistas kvar grandaj estaĵoj, t.e. la Homo, la Tero, la Ĉielo kaj la

Taŭo. Komprenoble, la Taŭo estas la plej alta inter la kvar, kaj el ĝi naskiĝis la tri aliaj. En tiu ĉi ĉapitro estas aparte atentinde, ke Laŭzi uzas kvar esprimojn por priskribi la movadon de la Taŭo: esti senfine granda, iradi konstante, atingi foren, reveni al la origino. Kunmetante popare tiujn ĉi kvar esprimojn, li konstruas tri frazojn, kiuj montras la procezon de la movado en senfinaj cikloj de la Taŭo. Jen la karakteriza trajto de la movado kaj la eterneco de la Taŭo.“



## 26

La pezo estas la radiko de la malpezo,  
La senmoveco estas la mastro de la movo.

Tial la Saĝulo, vojaĝante la tuta tagon,  
Neniam forlasas sian pakajĉaron.

Ĝuante luksan kaj komfortan vivon,  
Li ne dronas en ĝi.

Kiel do povas esti, ke la reganto de regno de dek mil  
militĉaroj  
malgrandigas sian gravecon sub Ĉielo?

La malpezeco neeviteble kondukas al la perdo de la  
radiko.

La leĝera movo neeviteble rezultigas la perdon de la  
mastreco.

## Rimarkoj pri 26

### Rimarkoj de Cezar

Rikardo Vilhelmo mencias interesan tekstvariaĵon en la lasta linio: „Pro leĝero oni perdas la ministrojn, pro maltrankvilo la reganton.“

Rikardo Vilhelmo, kiu vojaĝis plurfoje al Ĉinio kaj tie eĉ vivis kaj laboris kiel teologo kaj instruisto, ekzemple en Pekino dum la jaroj 1922 ĝis 1924, kaj kiu havis eĉ ĉinan edzinon, raportas, ke en Ĉinio nepre necesas ĉiam havi la pakaĵon ĉe si, ĉar la tranoktejoj ofte ne havis litaĵojn, do tiujn la vojaĝanto nepre devis havi ĉe si, se li ne volis travivi diversajn grandajn malagrabraĵojn. Tial ankaŭ jam Laocio pro tiaj kaŭzoj neniam disiĝis de sia pakaĵo, se li vojaĝis.

Tio, laŭ Anniespera nun ŝanĝiĝis. Do, leganto, tute ne timu! Vi povas ĝui la belan Ĉinion en nia tempo kompreneble sen kunprenitaj litaĵoj kaj sen pakaĵa ĉaro. Kaj esperantistoj volonte akceptas vin kiel gaston.

## 27

Bona migranto ne postlasas spuron.

Bona parolanto ne devas refuti ion.

Bona kalkulanto ne bezonas kalkulbastonetojn.

Bona fermulo bezonas nek seruron nek ŝlosilon,  
kaj tamen neniu povas malfermi tion, kion li fermis.

Bona kunligulo bezonas nek ŝnuron nek rubandon,  
kaj tamen neniu povas malligi tion, kion li kunligis.

La saĝulo ĉiam bone komprenas savi la homojn;  
tial por li ne ekzistas kondamnindaj homoj.

Li ĉiam bone komprenas savi la aĵojn;  
tial por li ne ekzistas forĵetindaj aĵoj.

Tio estas heredi la klarecon.

Tiel la bonaj homoj estas la instruistoj de la nebonuloj,  
kaj la nebonaj homoj estas la materialo por la bonuloj.

Tiu, kiu ne honorus sian instruiston  
kaj tiu, kiu ne ŝatus sian materialon,  
grave erarus, spite al ĉiuj siaj scioj.

Tio estas la granda sekreto.

## Rimarkoj pri 27

### Rimarkoj de Cezar

Ĉar seruroj kaj ŝlosiloj certe ne ekzistis en la tempo de Laocio, la traduko de Wang Chongfang evidente estas pli bona: „Tiu, kiu estas lerta en fermado, bezonas nenian riglilojn por fermi tion, kio ne estos malfermebla por aliaj. „ La moko pri tiuj, kiuj havas neniujn aliajn zorgojn krom gardi per suspektemaj okuloj siajn valorkestojn, trezorojn, konkubinojn kaj heredaĵojn per enfermado, ne estas preterlegebla. Tiu, kiu povas rezigni pri tro da riĉo, ne priŝteblas kaj entute vivas multe pli senzorge. Jen la enhavo ankaŭ de fama fabelo de fratoj Grimm: Feliĉa Joĉjo.

La kalkulbastonetoj de Rikardo Vilhelmo ĉe Wang Chongfang estas kalkulmarkoj. Sed ankaŭ bastonetoj laŭ Anniespera en antikva Ĉinio estis uzataj por la kalkulado.

Ke laŭ Laocio bona migranto ne postlasas spuron, cetere estis esenca parto de la vivfilozofio de la verkisto B.Traven. Eĉ mane skribitaj subskriboj por eldonistaj kontraktoj de li

apenaŭ riceveblis.

## 28

Tiu, kiu scias sian virecon  
kaj konservas sian inecon,  
estas la ravino de l' mondo.  
Se li estas la ravino de l' mondo,  
ne forlasas lin la eterna VIVO,  
kaj li fariĝas denove kiel infano.

Tiu, kiu scias sian purecon  
kaj konservas sian malforton,  
estas modelo por la mondo.  
Se li estas imitinda modelo por la mondo,  
ne foriĝas de li la eterna VIVO,  
kaj li returniĝas al nefariteco.

Tiu, kiu scias sian honoron  
kaj konservas sian honton,  
estas la valo de l' mondo.  
Se li estas la valo de l' mondo,

sufiças al li la eterna VIVO,  
kaj li revenas al la simpleco.

Se la simpleco estas disa, oni havas „uzeblajn“ homojn.  
Se la saĝulo uzas la simplecon, li fariĝas la mastro de l'  
oficistoj.

Tial: Granda formado  
ne bezonas pritrancôn.



## Rimarkoj pri 28

### Rimarkoj de Anniespera

En la originalo la vorto por pureco „*bai*“ (fonetike) signifas blankecon. La vorto „malforto“, en la originalo „*hei*“ (fonetike), signifas nigrecon. Se la simpleco estas disa, oni havas „uzeblajn“ homojn. (Vilhelmo) En la originala teksto la vorto „*qi*“ (fonetike ne signifas „homojn“, sed ilo aŭ vazo.

Vd. el s-ro Wang Chongfang:

„Kiam la simpleco (*pu*) estas disrompita, ĝi turniĝas en ilojn.“

„Se la saĝulo uzas la simplecon, li fariĝas la mastro de l' oficistoj.“ (Vilhelmo) Laŭ la originala teksto devus esti „la disa simpleco“.

Simpleco, la ĉina vorto „*pu*“ estas nesulptita peco da ligno, Laocio volonte uzis la vorton kiel metaforon por simpleco. (laŭ Wang Chongfang)

## 29

Voli konkeri kaj trakti la mondon;  
mi spertis, ke tio malsukcesas.  
La mondo estas sankta aĵo,  
kiun oni ne traktu.  
Kiu traktas ĝin, tiu ĝin fuŝas,  
kiu volas firmteni ĝin, tiu ĝin perdas.  
Tial la aĵoj aŭ antaŭeniras aŭ sekvas ion,  
kaj elspiras varme kaj blovas fride,  
estas aŭ fortaj aŭ malfortaj,  
aŭ naĝas supre aŭ falegas.  
Tial la saĝulo evitas  
la troon, la tro multan, la tro grandan.

## Rimarkoj pri 29

### Rimarkoj de Cezar

Mi lernis kaj konkludis el tiu ĉapitro, ke oni traktu nenion kaj neniun, ĉu bone ĉu malbone. Ĉiuj kaj ĉio havas sian propran naturon, sian propran evoluon, tiun mi ne ĝenu. Jen la kaŭzo, kial avangardaj iluzioj ofte havas terurajn sekvojn. Oni ne devigu socion aŭ individuojn al certa formo de la feliĉo, ĉiu el sia propra naturo mem serĉu kaj trovu sian feliĉon. Kion helpu avangardoj, se la individuoj de amaso ne mem eltrovas, kion ili bezonas? La feliĉon oni ne povas ordoni kaj ne donaci. Karitato kaj almozoj nur tie necesas, kie ekzistas granda socia maljusteco.

Kaj ankaŭ tion mi rememoris el tiu ĉi ĉapitro: la saĝulo ne celas esti la plej forta, la plej bela kaj la plej bona, jam tio estas ĝeno al ĉiuj tiuj, kiuj ne estas tiel fortaj, ne tiel belaj kaj ne povas esti tiel bonaj aŭ sanaj, ĉar mankas al ili la decida antaŭkondiĉo, la optimuma ekonomia bazo por esti perfektuloj. Ni vivas en neperfekta socio, kiel ni do povus esti perfektaj? Tio ne eblas. Krome: se mi venkus, aliaj

malvenkus. Tial Laocio instruas, ke ni rezignu pri ĉio, kio estas tro: tro da riĉo, tro da granda, tro da venkavido, tro da egoismo... tro da kio ajn. Ni estu prefere modestaj kaj ne senmezuraj, sen rampi pro tio surgenue. Ni estu memkonsciaj, rezistemaj al la malbono kaj neagemaj je ĉio, kio ĝenas la naturan iron de l' mondo, kontraŭ tio, kio ĝenas la Taŭon.

Kaj ankaŭ tion mi ekkomprenis en la ĉapitro, ke negado kaj neagemo povas enteni tre aktivan dialektikan flankon: la pasivan reziston kontraŭ ĉio, kio detruas la naturan iron de l' mondo. (cez).

## 30

Tiu, kiu helpas laŭ la maniero de TAŬO al homreganto,  
ne perfortas per armiloj la mondon,  
ĉar la agoj refalas sur la propran kapon.  
Kie restadis armeoj, kreskas kardoj kaj dornoj.  
Post la bataloj sekvas ĉiam jaroj de malsatego.  
Tial la bonulo serĉas nur la sukceson, nenion plu;  
li ne kuraĝas konkeri per perforto.  
Do sukceso sen fanfaroni,  
sukceso sen glori sin,  
sukceso sen fieri,  
sukceso, ĉar ĝi necesas,  
sukceso sen glori perforton.

## Rimarkoj pri 30

### Rimarkoj de Cezar

Anniespera mencias en siaj rimarkoj pri la traduko de Vilhelmo, ke en la originala teksto troviĝas ankoraŭ la sekvaj frazoj, tradukitaj de Wang Chongfang:

„La estaĵoj, atinginte sian plejfortecon, devas kreski maljunaj,

Kio estas kontraŭ la Taŭo.

Kaj ĉio, kio estas kontraŭ la Taŭo, senescepte iras al sia baldaŭa pere.“

La kontraŭmilitemo kaj pacamo de Laocio estas impresa kaj tre aktuala. Ankoraŭ nun ekzistas multaj registaroj, kiuj supozas, ke oni povu regi la mondon per perforto. La unua fama filozofia pachtalanto en la mondo estis sendube Laocio. Ke oni ĝis nun ofte ne komprenas la majstron, estas malĝojiga.

Cetere, tiun senkompromisan pacamon oni trovas ankaŭ ĉe Zamenhof. Tio estas la sama pacamo, el kiu ekestis Esperanto.

## 31

Armiloj estas malbonsignaj iloj,

ĉiuj estaĵoj abomenas ilin.

Tial, tiu, kiu agas laŭ la maniero de TAŬO,

ĉiam estas for de ili.

La noblulo en sia kutima vivo

rigardas la maldekstran flankon kiel honorlokon.

Ĉe la armeoj

la dekstra flanko estas la honorloko.

La armiloj estas malbonsignaj iloj,

ne iloj por la noblulo.

Nur, se li ne povas agi alie, li uzas ilin.

Trankvilo kaj paco estas por li la plej grava.

Li venkas, sed li ne ĝojas pri tio.

Tiu, kiu ĝojas pri tio, ĝojas ja pri la murdo je homoj.

Tiu, kiu ĝojas pri la murdo je homoj,

ne povas atingi sian celon en la mondo.

Ĉe feliĉigaj kazoj oni rigardas la maldekstran flankon kiel

honorlokon.

Ĉe malfeliĉigaj kazoj oni rigardas la dekstran flankon kiel honorlokon.

La subbatalestro staras maldekstre.

La supra batalestro staras dekstre,

tio estas, li lokigas sin

laŭ la moro de la funebraj ceremonioj.

Mortigi grandnombre homojn,

tion oni priplendu per ploroj de kompato.

Tiu, kiu venkis en la batalo,

restadu kiel ĉe funebra ceremonio.



## **Rimarkoj pri 31**

### **Rimarkoj de Rikardo Vilhelmo**

„La tuta teksto estas certe komento al la antaŭa. Wang Bi preteriras ĝin kun silento. En la malnovaj manuskriptoj ĝi ŝajne ne troviĝis.“

### **Rimarkoj de Cezar**

Ankaŭ Wang Chongfang mencias, ke troviĝas en la ĉapitro kelkaj frazoj interpolitaj kaj konfuzitaj, kiuj ŝajnis jam tiaj dum Han-dinastio.

Ĉiam se temas pri la temo paco, tuj aperas certaj prezentantoj de „pli altaj fortoj“, kiuj tuj asertas, ke ekzistas gravaj aferoj kaj principoj, kiuj estas eĉ pli gravaj ol la mondopaco mem, uloj, kiuj uzas sian grandan influon por malhelpi la pensadon pri la paco, kaj kiuj eĉ ne hezitas endubigi la frazojn de famaj pacbatalantoj; tio certe jam estis tiel dum la regado de la Han-dinastio. La vero por certaj regantoj povas fariĝi tre malagrabra, se ili ekzemple eĉ torturas en „siaj ministerioj de amo“, kiel sarkasme

mokis la verkisto Orwell en sia fama libro „1984“. La unua imperiestro en Ĉinio brutale murdigis centojn de konfuceaj eruditoj evidente nur tial, ĉar ili ne volis akcepti centprocente la „diajn verojn“ de sia kvazaŭ dia imperiestro.

## 32

La eterna TAŬO estas sennoma kaj simpla.  
Kvankam malgranda,  
la mondo ne kuraĝas fari ĝin servisto.  
Se princoj kaj reĝoj povus konservi ĝin,  
ĉiuj aĵoj estus kiel gastoj.  
Ĉielo kaj Tero unuiĝus,  
por gutigi dolĉan roson.  
La popolo sen ordonoj  
atingus per si mem la ekvilibron.  
Nur kiam la formado komenciĝas,  
ekestas nomoj.  
La nomoj atingas ankaŭ la estadon,  
kaj oni scias ankaŭ, kie oni devas halti.  
Se oni scias, kie oni devas halti,  
oni ne endanĝeriĝas.  
La rilatoj de TAŬO al la mondo  
kompareblas kun la montorojoj kaj valaj akvoj,

kiuj fluas en riverojn kaj marojn.

## Rimarkoj pri 32

### Rimarkoj de Anniespera

„Kuraĝas“ en la originala teksto la vorto „*neng*“ (fonetike) signifas „povas/ havas la kapablon“.

Vd. el Wang Chongfang:

„Ĝi povas esti subigita al nenio sub la Ĉielo.“

Bonvolu kompari ankaŭ la sekvajn frazojn. Vilhemo tradukis:

„La rilatoj de TAŬO al la mondo

komporeblas kun la montorojoj kaj valaj akvoj,

kiuj fluas en riverojn kaj marojn.“

Sed Wang Chongfang esprimas tion tiel:

„Ĉio sub la ĉielo revenos al la Taŭo,

Same kiel ĉiuj riveroj fluas al la maro.“

### Rimarkoj de Cezar

Estas interese, ke Laocio volis atingi, ke la popolo SEN ORDONOJ trovu sian ekvilibron. Tio estis en lia tempo aŭdaca penso. Klare li ekkonas, ke ekzistas rilato inter

nomoj kaj ordonoj, ili necesas por povi doni ordonojn. Ke homoj ankaŭ sen nomoj vivas kaj ekzistas, estas por moderna homo apenaŭ imagebla, sed tamen tiel estas: praloĝantoj ekzemple en la plugarbaroj de Brazilo ankoraŭ nun ne ĉiuj havas nomojn. La unuan, kion misiistoj faris, kiam ili konatiĝis al tiaj praloĝantoj, estis tio, ke ili donis nomojn al ili; indiĝenoj de Latin-Ameriko scias tre bone, ke tiu, kiu ne havas nomon, ankaŭ ne tiel simple puneblas. La neagado laŭ Laocio, kiu ankaŭ povas esti neordonado, ankaŭ en tiu ĉapitro estas la esenca temo. Wang Chongfang mencias, ke laŭ la kredo de ĉinaj antikvuloj, „dolĉa roso“ falas sur la homojn nur tiukaze, se la mondo estas en plena paco.

## 33

Tiu, kiu konas aliajn, estas prudenta.

Tiu, kiu konas sin mem, estas saĝa.

Tiu, kiu venkas aliajn, fortas.

Tiu, kiu venkas sin mem, estas fortega.

Tiu, kiu klopodas kun sukceso, havas volon.

Tiu, kiu estas kontenta, estas riĉa.

Tiu, kiu ne perdas sian lokon, daŭras.

Tiu, kiu ne pereos ankaŭ en la morto, vivas.

## **Rimarkoj pri 33**

### **Rimarkoj de Anniespera**

En la originalo sinsekvas la du subaj frazoj male.

„Tiu, kiu klopodas kun sukceso, havas volon.

Tiu, kiu estas kontenta, estas riĉa.“

„Klopodas kun sukceso“, en la originalo estas nur: „penas“  
aŭ „klopodas“.

### **Rimarkoj de Cezar**

Vivo post la morto por Laocio ŝajne ne tute maleblas, certe en tiu senco, kiel verkisto vivas, kiu estas legata plu tiel, kiel Laocio, kvankam li delonge estas morta. Vivanta estas ne nur tiu, kiu fizike vivas, sed ankaŭ tiu, kiu post sia morto plu efikas.

Ret Marut esprimis tion tiel: „Sed mi diras al vi: Vivas mortuloj, en kiuj estas pli da vivo ol en vivantoj; kaj loĝas vivantoj inter vi, kiuj estas mortaj jam ekde la unua lerneja tago, kvankam ili diras al vi: „Ni vivas, ĉar ni havas la



potencon!“ RET MARUT

## 34

La granda TAŬO estas inundanta;  
ĝi povas estis dekstre aŭ maldekstre.

Ĉiuj aĵoj dankas al ĝi sian ekziston,  
kaj ĝi ne rifuzas ilin.

Se la laboro estas plenumita,  
ĝi ne nomas ĝin sia posedo.

Ĝi vestas kaj nutras ĉiujn aĵojn  
kaj ne pretendas esti ilia mastro.

Ĉar ĝi eterne nepretendemas,  
oni povas nomi ĝin malgranda.

Ĉar ĉiuj aĵoj dependas de ĝi,  
eĉ sen koni ĝin kiel mastron,  
oni povas nomi ĝin granda.

Tiel agas ankaŭ la saĝulo:

La saĝulo neniam faras sin granda;  
tial la saĝulo plenumas sian grandan laboron.

Tial la saĝulo plenumas sian grandan verkon.

## Rimarkoj pri 34

### Rimarkoj de Cezar

TAŬO estas tio, kio ĉion kuntenas, eĉ la tutan universon, sen bezoni eĉ nur unu komandovorton! Sed kvankam ni ne vidas ĝin, ni povas ĝin senti kaj eĉ ekkompreni, se ni pretas por tio. Tio estas vere mistera, ĉu ne? Zamenhof faris el tiu sentata TAŬO kvazaŭ dion, la grandan nekonatan estaĵon, kiu gvidas nian sorton. Kaj ankaŭ el la filozofio de Laocio fariĝis religio, sed mi pensas tamen, ke Laocio mem tion tute ne celis. Li ne volis, ke ni preĝu al iu standardo, por povi sekvi al tio, kio ĉion harmonie kuntenas.

Vilhelmo:

„Se la laboro estas plenumita,  
ĝi ne nomas ĝin sia posedo.“

Tiuj du linioj sonas kiel ĝermo de Marks-penso: „La privata posedo faris nin tiel stultaj kaj unuflankaj, ke aĵo estas nur nia, se ni havas ĝin, do, se ĝi ekzistas kiel nia kapitalo aŭ se ni ĝin senpere posedas, manĝas, trinkas, je nia korpo

portas, en ĝi loĝas ktp., koncize, ĝin uzas. Kvankam la privata posedo ĉiujn ĉi senperajn efektivigojn de la posedo mem rigardas nur kiel „vivrimedojn“ kaj la vivo, al kiu servas la vivrimedoj, estas la vivo de l' privata posedo, do laboro kaj kapitaligo.“

Kaj efektive, posedopensado, estas nur tre limigita pensado, rilate al TAŬO. La pensoj de Laocio estas certe pli parencaj al aŭtentika komunismo ol al iu kapitalismo.

## 35

Kiu firmtenas la grandan prabildon,  
al tiu venas la mondo.

Ĝi venas kaj ne estas vundata,  
en kvieto, egaleco kaj beateco.

Muziko kaj logaĵo:

Ili certe haltigas la migranton sur lia vojo.TAŬO eliras el  
la buŝo,  
milde kaj sen gusto.

Vi rigardas al ĝi kaj ne vidas ion nekutiman.

Vi aŭskultas al ĝi, kaj ne aŭdas ion nekutiman.

Vi agas laŭ ĝi kaj ne trovas finon.

## **Rimarkoj pri 35**

### **Rimarkoj de Cezar**

Interesa kaj grava estas ofte tio, kio tute ne trovas atenton. Ĉar ĝi ne estas pompa, ne brila, ne multekosta, ne riĉa, ne atentofrapa.... Sed kio estus la mondo ekzemple sen la tiom ofte malŝatataj laboristoj kaj kampanoj, kio sen la afableco de homoj, sen rideto de infanoj? Aŭ sen blovfloretoj sur herbejoj, kiuj memorigas nin pri tio, ke ni estas pli ol nur laborantaj maŝinoj. Kaj tamen eĉ tio, kio kuntenas ĉion, apenaŭ trovas atenton en nia hastiga tempo. La kreskado de la grenkampoj, por doni ekzemplon, estas grandioza afero, sed ĝi okazas tute mallaŭte.

### **Rimarko de Anniespera**

„Tute kiel la aero, ĉu ne? Sen aero ni ne povas vivi, tamen ĝin ni ne vidas, nek aŭskultas.“

## 36

Kion vi volas kunpremi,  
tion unue etendigu.

Kion vi volas malfortigi,  
tion unue tute fortigu.

Kion vi volas neniigi,  
tion unue ekflorigu.

Se vi volas preni ion de iu,  
unue donu ion al li.

Tio nomiĝas sagaco pri la nevidebla.

La mola venkas la duran.

La malforta venkas la fortan.

La fiŝon oni ne prenu el la profunda akvo.

La prosperigilojn de la regno ni ne montru al homoj.

## **Rimarkoj pri 36**

### **Rimarko de Cezar**

Jen la lasta linio en alia germana tradukversio: „Akrajn armilojn oni ne montru al la popolo.“

La fama diro de Laocio, ke la mola venkas la duran, inspiris la nederlandan popmuzikteamon „Bots“ al la konata packanto: „Mola akvo“

### **Rimarko de Anniespera**

En la originala teksto, la vortoj „*li qi*“ (fonetike) signifas „la plej akraj armiloj“. Vidu ĉe Wang Chongfang:  
„Kaj la plej akraj armiloj de la regno  
Ne povas esti montrataj al homoj.“



## 37

TAŬO estas eterna sen farado,  
sed nenio restas nefarata.

Se princoj kaj reĝoj komprenas konservi ĝin,  
ĉiuj aĵoj formiĝas per si mem.

Se ili formiĝas kaj leviĝas la avidoj,  
mi bridus ilin per sennoma simpleco.

Sennoma simpleco efektivigas sendezirecon.

Sendezireco faras kvieta,  
kaj la mondo evoluas per si mem.

## Rimarkoj pri 37

### Rimarkoj de Cezar

La usona verkisto Charles Bukowski en iu prozpoemo rimarkas, ke li „ŝatas ĉiujn aĵojn, kiuj iras per si mem“. Kiel ekzemplon li nomas ankaŭ ruliĝantajn ludpilkojn kaj sapvezikojn. Unufoje survojitaj, ili serĉas mem sian vojon. Tiu rimarko celas kompreneble ankaŭ homojn. Homoj, kiuj iras per si mem, kiuj ne bezonas ordonon por agi en la intereso de la homaro, estas por mi tiuj, kiujn ni nepre bezonas, homojn, kiuj nur agas laŭ ordonoj kaj komandoj, ne kapablus krei ordonon, en kiu la libera evoluo de ĉiu estas la bazo por la libera evoluo de ĉiuj kaj ĉio. Ĝuste tion celas ankaŭ Laocio, homojn, kiuj iras per si mem, en mondo, kiu kvazaŭ iras per si mem, sen perforto, sen subigo, en la natura fluo de la evoluado. Kaj tial mi tiom ŝategas tiun grandiozan filozofon, kiu ne simpligis la mondon al nura ekonomia maŝino, kiel tion sufiĉe ofte faris kaj faras iuj polve sekaj ŝajnamarksisistoj kaj aliaj ekonomiaj fetiĉistoj, kiuj supozas, ke la brutala subigo de la homoj sub „ferajn“ ekonomiajn leĝojn kaj interesojn nepre necesas por

progresi entute. Tute male ni devas adaptiĝi al la leĝoj de la kosmo, ni bezonas universalan vidpunkton, kiu tamen inkludas ĉiun unuopan individuon surtere, tiel, kiel tion instruas jam Laocio, tiukaze irus ĉio kvazaŭ per si mem. Tute en la senco de TAŬO de Laocio. Laŭ liaj principoj ĉiu milito de homoj kontraŭ homoj kompreneble estas fia agado, do tute kontraŭproduktiva kaj nenecesa. Jen sfero, en kiu neagado estus plej ofte multe pli utila ol ĉiu agado.

# DUA PARTO

## La vivo

### 38

Kiu fidas al supera VIVO,  
tiu scias nenion pri la VIVO;  
tial li havas VIVON.

Kiu ne fidas superan vivon,  
tiu provas ne perdi la VIVON;  
tial li ne havas VIVON.

Kiu fidas superan vivon,  
tiu ne agas kaj ne havas intencojn.

Kiu ne fidas superan VIVON,  
tiu agas kaj havas intencojn.

Kiu fidas la amon, tiu agas, sed ne havas intencojn.

Kiu fidas la justecon, tiu agas kaj havas intencojn.

Kiu fidas la virton, tiu agas,

kaj se iu ne respondas al li,  
li gestas per zigzagantaj brakoj kaj alvenigas tiun.

Tial: Se TAŬO estas perdita, aperas VIVO.

Se VIVO estas perdita, aperas la amo.

Se la amo estas perdita aperas la justeco.

Se la justeco estas perdita, aperas la moro.

La virto estas la mizero de fido kaj kredo

kaj la komenco de l' konfuziĝo.

Antaŭsciado estas la ŝajno de TAŬO

kaj la komenco de l' malsaĝeco.

Tial la vera homo restadas ĉe la tuto

kaj ne ĉe mizera parto.

Vera homo loĝas en la estado kaj ne en la ŝajno.

Tia homo ignoras la ŝajnon kaj tenas sin al la ĉi tiea.

## Rimarkoj pri 38

### Rimarkoj de Cezar

Denove interesa legaĵo. Se TAŬO, tio, kio kuntenas ĉion, kio efikas en ĉio, estas perdita, aperas la vivo, se tio malaperis, la amo, se ĝi malaperis, la justeco. Certe multaj homoj scias aŭ divenas tion, sed kiom da ili agadas laŭ tio? Certe ne multaj. Kaj eĉ malpli da homoj konscias, ke la virtoj kaj leĝoj estas jam la komenco de l' konfuziĝo. Ĉar en libera socio neniu plu parolos pri tio, kio estas ĉiutaga normaleco.

Interese estas ankaŭ, ke la amo ĉe Laocio estas evidente nur triaranga, do tute ne unuaranga, kiel ĉe hipokritaj ŝlagrokantistoj en Eŭropo. Certe la majstro ankaŭ tiurilate tute pravas. Unue ni devas esti naskitaj, poste vivi je daŭro, kaj tiam ni povos ankaŭ ami iun.

Anniespera atentigas pri tio, ke en la originala ĉapitro temas rilate al VIVO pri „supera virto“, fonetike: „*shang de*“ kaj „malsupera virto“, fonetike „*xia de*“. Rikardo Vilhelmo laŭvorte tradukis tion tiel: „Kiu tenas alte (aŭ malalte) la

vivon“, sed li celas kiel Wang Chongfang superan kaj  
malsuperan virton.

## 39

Tiuj, kiuj iam atingis Unuon:

Ĉielo atingis Unuon kaj fariĝis pura.

Tero atingis Unuon kaj fariĝis firma.

La dioj atingis Unuon kaj fariĝis potencaj.

La valo atingis Unuon kaj pleniĝis.

Ĉiuj aĵoj atingis Unuon kaj ekestis.

Reĝoj kaj princoj atingis Unuon

kaj fariĝis la modelo de l' mondo.

Ĉion tion efikigis Unuo.

Se Ĉielo ne estus pura per tio, tiukaze ĝi devus krevi.

Se Tero ne estus firma per tio, ĝi devus ŝanceliĝi.

Se la dioj ne estus potencaj per tio,

tiukaze ili devus rigidiĝi.

Se la valo ne estus plenigita per tio,

tiukaze ĝi devus elĉerpiĝi.

Se ĉiuj aĵoj ne estus ekestintaj per tio,

tiukaze ili devus estingiĝi.



Se la reĝoj ne estus majestaj per tio,  
tiukaze ili devus renversiĝi.

Tial la radiko de la nobla estas la malnobla.  
La alta bazas sin sur la malalta.

Do tiel ankaŭ la princoj kaj reĝoj:  
Ili nomas sin: „Soleculo“ „Orfulo“, „Malgravuo“.  
Per tio ili deklaras la humilan kiel sian radikon.  
Aŭ ĉu ne estas tiel?

Ĉar sen la partoj de ĉaro ne ekzistus ĉaro.  
Deziru al vi ne la brilantan trembrilon de la juvelo,  
sed la malglatan krudecon de l' ŝtono.

## **Rimarkoj pri 39**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Wang Chongfang atentigas nin, ke la Unuo estas alia nomo por Taŭo. „Ĉar sen la partoj de ĉaro ne ekzistus ĉaro“, tiu frazo deflankiĝas de la originala teksto.

En la originala teksto la vorto „yu“ (fonetike) ĉi tie egalas „honoron“, kies origina senco ja estas ĉaro, sed ĉi tie ĝi estis ŝanĝe uzita.

Vd. el Wang Chongfang:

„Tial serĉi tro da honoro signifas tute perdi la honoron.“

### **Rimarkoj de Cezar**

Ke la noblulo rigardas la malnoblan kiel sian radikon, estas plia tre interesa frazo de Laocio, kiu denove montras, kiel dialektike li pensis, certe li estis influata ankaŭ de la antikva greka filozofio, kiu sur la grandaj komercvojoj, disvastiĝis ĝis Ĉinio.

En morkanto de revoluciemaj kamparanoj en Eŭropo oni kantis en la mezepoko: „Sed kiam Adamo fosis kaj Evo ŝpinis, kie estis tiam la nobelulo?“ La tiama konkludo estis, ke kamparanoj estas eĉ pli gravaj por la vivo de ĉiuj ol la nobeluloj. Nun la laboristoj kaj kamparanoj estas tiuj, kiuj estas pli malhaveblaj por la vivo de ĉiuj ol ĉiuj politikistoj, ĉar sen ili la politikistoj baldaŭ mortus pro malsato kaj estus eĉ nudaj, ĉar la vestojn de ĉiuj produktas kutime la malestimata laboristaro de la tekstilindustrio.

La lasta alineo povus esti indiko, ke Rikardo Vilhelmo estis framasonisto, tiel, kiel ankaŭ Zamenhof. La kruda ŝtono en la framasonismo estas la instruato, la metia lernanto, kiu devas trapaŝi kelkajn ekzamenojn antaŭ ol li fariĝas majstro. En la originalo ne temas pri kruda ŝtono sed pri roko, kompare al jado.

## 40

Reveno estas la moviĝo de TAŬO.

Malforteco estas la efiko de TAŬO.

Ĉiuj aĵoj sub Ĉielo ekestas en la estado.

La estado ekestas en la neestado.

## 41

Se saĝulo de la plej granda speco aŭdas pri TAŬO,  
li estas diligenta kaj agas laŭ ĝi.

Se saĝulo de averaĝa speco aŭdas pri TAŬO,  
li parte akceptas ĝin kaj parte dubas pri ĝi.

Se saĝulo de malsupera speco aŭdas pri TAŬO,  
jen li laŭte ridas pri ĝi.

Se li ne laŭte ridus,  
tiukaze ĝi ankoraŭ ne estus la vera TAŬO.

Tial proverba verkisto diras:

„La evidenta TAŬO ŝajne estas malhela.

La TAŬO de la antaŭenirado ŝajne estas retiriĝo.

La ebena TAŬO ŝajne estas malglata.

La plej granda VIVO ŝajne estas valo.

La plej granda pureco ŝajne estas hontego.

La vasta VIVO ŝajne estas nesufiĉa.

La forta VIVO ŝajne estas hezitema.

La vera esenco ŝajne estas ŝanĝiĝema.

La granda kvarangulo ne havas angulojn.

La granda ilo estas perfektigita post multe da tempo.

La granda sono sonas neaŭdeble.

La granda bildo ne havas formon.“

La kaŝita TAŬO estas sen nomo.

Kaj tamen ĝuste TAŬO estas bona

ĉe la donacado kaj perfektigado.

## Rimarkoj pri 41

### Rimarkoj de Anniespera

En la originala teksto, la vorto „*shi*“ (fonetike) ĉi tie estas tia homo, kiu ricevas edukon. S-ro Wang Chongfang esperante tradukis ĝin per „klerulo“. Pensu, se li estus vera „saĝulo“, eĉ se nur „de malsupera speco“, li ne devus „laŭte ridi pri ĝi“, ĉu ne? Alie li ne estas saĝulo. ^\_^

La evidenta senco de la esprimo „klara senco“, estas ĉe Wang Chongfang „brila“.

En la originala teksto, la vorto „*ru*“ (fonetike) ĉi tie signifas „hontigite nigra“. Kaj „*bai*“ (fonetike) signifas „blanka“. Jen blanka-nigra. Kontrasto.

S-ro Wang Chongfang ĉi tie laŭsence tradukis tiel:

„La plej granda honoro ŝajnas esti malhonoro.

La vera esenco ŝajne estas ŝanĝiĝema.

La granda kvarangulo ne havas angulojn.“

En la originala teksto, la vorto „*fang*“ (fonetike) ĉi tie signifas „kvadrato.“ Vd. el Wang Chongfang: „La plej granda

kvadrato havas nenian angulon...”

Vilhelmo:

„La granda ilo estas perfektigita post multe da tempo.“

En la originala teksto, la vorto „*wan cheng*“ (fonetike) ĉi tie signifas „pli malfrue finfarita“.

Vd. el Wang Chongfang:

„La plej valora vazo ĉiam estas laste finfarita

La granda sono sonas neaŭdeble.

La granda bildo ne havas formon.“

Vilhelmo:

„La kaŝita Taŭo estas sen nomo.“

La traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„La Taŭo estas kaŝita kaj sennoma...”

Vilhelmo: „Kaj tamen ĝuste Taŭo estas bona  
ĉe la donacado kaj perfektigado.“

La traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„Sed estas nur la Taŭo, kiu iniciatas ĉiujn estaĵojn kaj  
kondukas ilin al kompletiĝo.“



Atentu: En la originala teksto, la vorto „*wei*“ (fonetike) signifas „nur“, tial la esprimo „Kaj tamen ĝuste TAŬO“ estas ne tre taŭga.

## **Rimarko de Cezar**

Mi ne rajtas glatigi ion en mia traduko favore al la originalo, ĉar alie mia traduko perdus sian sencon. Mi volas montri, kiel la eŭropanoj komprenas aŭ eĉ miskomprenas la majstron.

## 42

TAŬO faris la unuecan.

La unueca la duecan.

La dueca la triecan.

La trieca ĉiujn aĵojn.

Ĉiuj aĵoj havas dorse la malhelan

kaj strebas al lumo,

kaj la fluanta forto donas al ili harmonion.

Kion homoj malamas,

tio estas esti forlasito, solulo, senindulo.

Kaj tamen princoj kaj reĝoj elektas

la vortojn por nomi sin tiel.

Ĉar la aĵoj aŭ pliiĝas per malplimultigo

aŭ malpliiĝas per plimultigo.

Kion aliaj instruas, tion ankaŭ mi instruas:

„La fortuloj ne mortas laŭ natura morto.“

Tion mi volas fari elirpunkto de mia instruo.

## **Rimarkoj pri 42**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Vilhelmo:

„Ĉiuj aĵoj havas dorse la malhela  
kaj strebas al lumo“

La traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„La miriadoj da estaĵoj entenas en si la jinon kaj la jangon  
kiel du kontraŭajn fortojn.“

### **Rimarko de Cezar**

Estas do pli verŝajne, ke Laocio tiurilate celis la duecon de  
la aĵoj, kaj ne certan naskon el kosma malhelo, kiel supozas  
verŝajne Vilhelmo.

## 43

La plej mola sur la Tero  
preterpasas la plej duran surtere.

La neekzistanta penetras eĉ en tion,  
kio ne havas interspacon.

Je tio oni ekkonas la valoron de la senagado.

La instruadon sen vortoj, la valoron de la senagado  
atingas nur malmultaj surtere.

## **Rimarkoj pri 43**

### **Rimarko de Anniespera**

Wang Chongfang tradukis la du unuajn liniojn tiel:

„Tio, kio estas la plej mola sub la Ĉielo(1),

Povas galopi tra tio, kio estas la plej malmola(2);“

1 T.e. la akvo.

2 Ekz. la roko.

## 44

Kio estas pli grava al ni,  
la renomo aŭ la persona stato?

Kio estas pli valora,  
la stato de persono aŭ ties posedo?

Kio estas pli malbona,  
gajni aŭ perdi?

Sed nun tio:

Tiu, kiu dependigas sian koron de alia,  
neeviteble foruzas grandan.

Tiu, kiu multe kolektas,  
neeviteble perdas gravan.

Tiu, kiu estas kontenta,  
ne fariĝas hontinda.

Tiu, kiu scias halti ĝustatempe,  
ne endanĝerigas sin  
kaj tiel povas ekzisti eterne.

## **Rimarkoj pri 44**

### **Rimarko de Anniespera**

Vilhelmo:

„Tiu, kiu dependigas sian koron de alia,  
neeviteble foruzas grandan.“

La laŭvorta traduko estus tiel:

„Tro da amo necese foruzas grandan.“



## 45

Granda perfektigŝajnas kvazaŭ nesufiĉa,  
tiel ĝi fariĝas senlima dum sia efiko.

Granda pleno ŝajnas kvazaŭ torenta,  
tiel ĝi fariĝas senelĉerpebla dum sia efiko.

Granda rekteco aspektas kvazaŭ kurbigita.

Granda talento ŝajnas kvazaŭ stulta.

Granda elokvento ŝajnas kvazaŭ muta.

Movado venkas la fridon.

Kvieto venkas la varmegon.

Pureco kaj kvieto estas la juĝmezurilo de l' mondo.

## Rimarkoj pri 45

### Rimarkoj de Cezar

Laŭ Anniespera la originala vorto „*chong*“, tradukita de Vilhelmo per „torenta“, havas pluajn sencojn, ekzemple „malplena“ ks. Se oni tralegis la tutan tekston laŭ ŝi facile konstatablas, ke Laocio traktis sian ideon per kelkaj paroj da kontraŭvortoj. Tial, ankaŭ post komparo al la traduko de Wang Chongfang, la signifo de la originala vorto „*chong*“ estas „malplena“ kaj ne „torenta.“ „Granda talento“ tradukas Wang Chongfang per „lerto“. La vorto „muta“ laŭ la originalo devus esti „balbutema“. „Movado“ de Vilhelmo en la originalo estas „rapida moviĝo“.

## 46

Se TAŬO regas surtere,

la kurĉevaloj estas uzataj por sterki kampojn.

Se TAŬO malĉeestas surtere,

oni bredas militĉevalojn sur komuna herbejo.

Ne estas pli granda peko ol multaj deziroj.

Ne estas pli granda fiaĵo ol malkontenteco.

Ne estas pli granda eraro ol avidi havi.

Tial la kontento pri la kontento estas daŭra kontento.

## **Rimarkoj pri 46**

### **Rimarko de Cezar**

Ankaŭ en tiu ĉi ĉapitro Laocio prezentis kvazaŭ tute modernajn postulojn: ke oni amu la pacon, ke oni misfidu al tro da posedo kaj modestu pri la uzado de niaj naturaj resursoj.

Vilhelmo:

„Se TAŬO malĉeestas surtere,  
oni bredas militĉevalojn sur komuna herbejo.“

### **Rimarko de Anniespera**

La originala teksto de tiu ĉi frazo lauvorte eble tradukeblus tiel:

Militĉevalo naskiĝas sur kampo apud batalejo.

Ne estas pli granda peko ol multaj deziroj.

Ne estas pli granda fiaĵo ol malkontenteco.

Ne estas pli granda eraro ol avidi havi.

Vd. en la traduko de Wang Chongfang:

„Nenia malfeliĉo estas pli granda ol la malkontenteco;

Nenia kulpo estas pli granda ol la nesatigebla avido.“

## 47

Sen irado el la pordo  
oni konas la mondon.

Sen rigardado el la fenestro  
oni vidas TAŬO-n enĉielan.

Ju pli iu eliras,  
des malpli fariĝas ties scio.

Tial la saĝulo ne eliras  
kaj scias tamen ĉion.

Li ne vidas ion  
kaj tamen pensas klare.

Li faras nenion  
kaj tamen plenumas ĉion.

## **Rimarkoj pri 47**

### **Komento de Wang Chongfang**

„Tiu ĉi ĉapitro pritraktas ĉefe la metodon kompreni la Taŭon. Laŭ Laŭzi ĉiuj estaĵoj en la universo moviĝas aŭ funkcias laŭ iaj leĝoj, kaj se oni bone konas tiajn leĝojn aŭ principojn, oni povas klare vidi la esencon de ĉiu estaĵo kaj kapti la veron de la ekstera mondo, kaj tion ĉi oni povas plenumi nur per kontemplado anstataŭ per la penado akiri praktikajn spertojn. Laŭzi neas la valoron de la funkcio de praktikaj spertoj en la konado de la mondo kaj rekomendas kontempladon, t.e. enrigardon en sian menson. Laŭ li la fundo de la homa menso estas kvazaŭ klara spegulo, kiel menciite en ĉap. 10, spegulo, en kiu la ekstera mondo estas reflektita, tial per kontemplado oni povas scii ĉion sub la Ĉielo kaj ekkompreni la Taŭon.“

### **Cezar-komento**

Jen tre interesa komento, kiu klarigas, kial Laocio tiom malagemas. Sed certe Laocio pri tiu afero ne pravas. Marks

respondus per sia Feuerbach-tezo 2 la sekvan al li:  
„La demando, ĉu la homa pensado estas objektiva vero, ne estas demando de l' teorio, sed praktika demando. En la praktiko la homo devas pruvi la veron, tio estas la realecon kaj potencon, la ĉi-tiean manieron de sia pensado. La kverelo pri la vero aŭ nevero de pensado, kiu izolas sin de la praktiko, estas pure skolastika demando.“

*(Marks-Engels-verkoj, vol.3, paĝo 533, Dietz-eldonejo, Berlino 1969)*



## 48

Tiu, kiu ekzercas la lernadon, pliigas sin ĉiutage.

Tiu, kiu ekzercas TAŬO-n, pli kaj pli malpliigas sin.

Tiu, kiu pli kaj pli malpliigas sin, alvenas ĉe la neagado.

Dum la neagado restas nenio nefarita.

Regi regon oni povas nur,

se oni ĉiam estas libera de tro da sindevigo.

La multokupatoj ne taŭgas regi la regnon.

## Rimarkoj pri 48

### Rimarko de Cezar

Mi nun ekkomprenis dum la retradukado, ke neagado ne estas identa al nefarado. Oni povas fari ion sen tro da agademo dum tio. Tio memorigas min pri la lingva leĝo de sufiĉo kaj neceso, kiu estas grava leĝo uzata en bonstila Esperanto kaj ankaŭ en ĉiuj aliaj lingvoj kaj sferoj. Tro da okupiteco estas ofte nur neproduktiva kaj nekreiva „kurado en hamstrorado“. Tro da rutino aŭ tro da agademo aŭ sindevigo mortigas la liberan spiriton. Libera spirito ne kuradas kiel freneziĝinta aĉetanto en supermarketo kaj apenaŭ povas spiri plu pro tro da hastemo. Libera spirito havas ĉiam la tempon, kiun li bezonas, egale pri kio temas. Nenio povas hastigi homon kun tia spirito, kvazaŭ kiel budha monaĥo li ĉiam tute ripozas kvazaŭ en si mem, kaj eĉ plu tiam, kiam li estas kiom ajn multokupita. (cez)

## 49

La saĝulo ne havas propran koron.

Li faras el la koroj de la homoj sian.

Al la bonuloj mi estas bona,

ankaŭ al la nebonuloj mi estas bona;

ĉar VIVO estas boneco.

Al la fidindaj mi estas fidinda,

ankaŭ al la nefidindaj mi estas fidinda;

ĉar VIVO estas fidindeco.

La saĝulo vivas en la mondo tute kvieta

kaj vastigas sian koron por la mondo.

Ĉiuj homoj rigardas al li kaj aŭskultas lin.

Kaj la saĝulo akceptas ilin ĉiujn kiel siajn infanojn.

## Rimarkoj pri 49

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„ĉar VIVO estas boneco.“

La vivo mem ne estas boneco, sed oni povas atingi ĝin laŭ Laocio.

Vilhelmo:

„Al la fidindaj mi estas fidinda,  
ankaŭ al la nefidindaj mi estas fidinda;“

En la originala teksto Laocio fidas kaj al fidindaj kaj al nefidindaj. ĉar VIVO estas boneco. Vivo mem ne estas fidindeco, sed oni povas atingi ĝin laŭ Laocio.

Vilhelmo:

„La saĝulo vivas en la mondo tute kvietaj“

La frazo ne estas en la originalo.

## **Rimarko de Cezar**

Kiom ofte oni ridis jam pri la diro de Jesuo, ke oni post ricevo de bato sur vango prezentu ankaŭ la alian por ricevi pluan baton. La ridantoj pensas, ke tio estas tute stulta ago. Sed jam Laocio rekomendis, ke oni respondu malbonecon per boneco. Bonulo laŭ Laocio havas pli da reputacio ĉe la homoj ol perfortulo. Mi pensas, ke tio certe estas bona strategio, almenaŭ pli bona ol tiu, kiu baziĝas nur sur venĝo, aŭ eĉ pli terure sur „militaj rebatoj“. Sirio, en kiu devis morti pli ol mil da homoj en venena gaso kaj poste ambaŭ partioj asertis, ke ili ne kulpas pri tio, estas aktuala kruela ekzemplo por tio, kiom la mita Jesuo kaj Laocio pravas! Per perforto paco neniam kreblos, nur senfina spiralo de perforto tiel ekestas. Bonulo estas tiu, kiu ne havas koron por si mem, sed por ĉiuj.

## 50

Elirado estas vivo, enirado estas morto.

Kamaradoj de la vivo estas triono el dek homoj.

Kamaradoj de l' morto estas triono el dek homoj.

Homoj, kiuj vivas kaj dum tio moviĝas al la loko de la morto, estas same triono el dek homoj.

Kio estas la kaŭzo pri tio?

Ĉar ili volas plilongigi la vivon.

Mi ja aŭskultis, ke tiu, kiu scias vivi,

migrante tra la lando,

nek renkontas rinoceron nek tigrojn.

Li paŝas tra armeo kaj ne evitas kirasojn kaj armilojn

La rinocero trovas nenion, en kion ĝi povus bori per sia korno.

La tigro trovas nenion,

en kion ĝi povus bati per siaj ungegoj.

La armilo trovas nenion, kio povus percepti la akridon.

Sed kial?

Ĉar tia homo ne havas morteblan lokon.

## Rimarkoj pri 50

### Rimarkoj de Cezar

La pacifisma malmilitemo de Laocio en tiu ĉapitro kvazaŭ saltas el ĉiu linio. La unua imperiestro de Ĉinio, kiu volis vivi eterne, pensis ekzakte male. Tial li fidis al neniu kaj konkeris multajn landojn, kaj tamen li ĉiutage devis timi pri sia vivo, spite al tio, ke multaj gvardianoj de kirasita armeo, unu el la plej grandaj de lia tempo, tage kaj nokte protektis lin.

Homo, kiuj ne havis morteblan lokon krom unu, troviĝas en la germana Nibelungen-legendo. La heroo Siegried (Venkopaco) estis ne mortigebla, ĉar li banis en drakosango, nur je tiu loko, kie li surhavis dum la banado tilian folion, li estis mortigebla. Lia murdisto Hagen de Tronje pikis de malantaŭe per lanco en tiun vundeblan lokon, kiam Hagen trinkis freŝan akvon en rojo. Ankaŭ la greka militfurioza heroo Aĥilo estis preskaŭ tute nemortigebla, ĉar li banis en la submonda rivero Stikso. Sed ankaŭ li havis tian vundeblan lokon, la kalkanumon, kaj fine li devis morti. Ĉar



Homero vivis proksimume 850 jarojn antaŭ Kristo, povas esti ke Homero influis nerekte komercvoje Laocion. Mi bone povas imagi, ke la greka mitologio en la antikva Ĉinio ne estis tute nekonata, ĉar ĝi disvastiĝis sur malnovaj komercvojoj ĝis tien.

## 51

TAŬO estigas la aĵojn.

VIVO nutras ilin.

La ĉirkaŭejo formas ilin.

La influoj perfektigas ilin.

Tial ĉiuj estaĵoj honoras TAŬO-n

kaj ŝatas VIVO-n.

TAŬO estas honorata,

VIVO estas ŝatata

sen ekstera nomumo, tute per si mem.

Do: TAŬO estigas ilin,

VIVO nutras ilin,

kreskigas ilin, flegas ilin,

perfektigas ilin, konservas ilin,

kovras kaj protektas ilin.

## Rimarkoj pri 51

### Rimarkoj de Anniespera

En la originala teksto la vorto „ĉirkaŭejo“ *wu* (fonetike) signifas „materio“ kaj la vorto „Cinfluoj“ „*shi*“ (fonetike) signifas „cirkonstanco“.

En la traduko de Vilhelmo mankas la sekvaj frazoj, tradukitaj de Wang Chongfang:

„Doni vivon al ili sen ilin posedi,  
Meti ilin en movon sen atribui al si la meriton,  
Kaj esti ilia suvereno sen ilin regi,  
— Ĉio ĉi estas nomata la profunda Virto.“

### Rimarkoj de Cezar

„Ĉu oni nepre devas posedi ion por esti sukcesa?“ Tiu demando fariĝis centra temo ĉe Karlo Marks. Ĉe la individua anarkiisto Maks Stirner tiu demando havas krom la jura signifo ankaŭ alian. Laŭsence li demandis: Kiu vere posedas la mondon, ĉu tiu, kiu laŭjure posedas ĝin, aŭ tiu, kiu efektive regas ĝin spertante, prilaborante, esplorante

kaj eĉ estetike ĝuante? Ĉu posedanto de io estas vere nur ties jura posedanto aŭ tiu, kiu vere regas iun proceson, iun aĵon aŭ iun personon?

## 52

La mondo havas komencon,  
tio estas la patrino de l' mondo.  
Tiu, kiu trovas la patrinon  
por koni la infanojn,  
kiu tiam konas ŝiajn infanojn  
kaj revenas al la patrino,  
dum sia tuta vivo ne endanĝeriĝos.  
Tiu, kiu fermas sian buŝon  
kaj fermas sian pordojn,  
dum sia tuta vivo ne devos suferi.  
Al tiu, kiu malfermas sian buŝon  
kaj volas enordigi siajn negocojn,  
ne eblas helpi dum ties tuta vivo.  
Vidi la plej sensignifan signifas sagaci.  
Konservi la saĝon signifas esti forta.  
Se oni uzas sian lumon  
por reveni al la sagaco,

tiukaze oni ne endanĝerigas sian personon.

Jen la mantelo de l' eterneco.

## **Rimarkoj pri 52**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Pri reveni al la patrino: En la originala teksto, la vorto „*shou*“ (fonetike) signifas „gardi, defendi, protekti.“

Vd. de Wang Chongfang:

„Povas firme alkroĉiĝi al la Patrino“

En la originala teksto, la vorto „*rou*“ (fonetike) signifas „moleco, malfortecon.“, male al via traduko “forta“.

„Kaj tiu, kiu gardas siajn molecon kaj malfortecon, estas potenca.“

### **Rimarko de Cezar**

Sekve tion, homo, kiu rigardas nur sian fortecon, estas en vero malforta, ĉar tiu homo uzas nur parton de sia personeco. Kaj saĝo do signifas ankaŭ povi esti malforta, mola. Krudulo estas nur korpe forta, sed ne ties psiko.

## 53

Se oni vere scias, kion tio signifas,  
vivi en la granda TAŬO,  
tiukaze estas unue la negocemo,  
kiun oni tiom timas.

Kie la grandaj stratoj estas grandaj kaj ebenaj,  
sed la popolo ŝatas flankvojojn;  
kie la kortegaj leĝoj estas severaj,  
sed la kampoj plenaj de fiherboj;  
kie la grenejoj estas tute malplenaj,  
sed la vestoj elegantaj kaj pompa;  
kie ĉiu portas akran glavon ĉezone,  
kie oni estas tro elektema pri manĝo kaj trinkaĵoj  
kaj posedoj estas abunde:  
jen regas konfuziĝo, ne regado.



## Rimarkoj pri 53

### Rimarko de Cezar

Mi ĵus legis matene en gazeto, ke la plej multekosta diamanto tutmonde momente estas ofertata por 56 milionojn da eŭroj. Mi pensis tuj: „Kiom da homoj oni povus nutri kun tiu sumo, kiom da domoj oni povus konstrui por senhejmuloj.“ Do: ankaŭ ni ofte vivas nur en konfuziĝo kaj ne estas vere regata sed nur subigata. Ĉar vera regado ne permesus, ĉielkriantan povrecon apud arogantega luksego. Luksego surbaze de povreco estas krimo kontraŭ la malriĉuloj.

## 54

Tio, kio estas bone plantita, ne estos elŝirita.

Tio, kio bone estas firmitenata, ne forglitos.

Tiu, kiu postlasas sian memoron al filoj kaj nepoj,  
ne ĉesas ekzisti.

Tiu, kiu formas sian personon, ties vivo fariĝas vera.

Tiu, kiu formas sian familion, ties vivo fariĝas plena.

Tiu, kiu formas sian komunumon, ties vivo kreskos.

Tiu, kiu formas sian landon, ties vivo fariĝas riĉa.

Tiu, kiu formas la mondon, ties vivo fariĝas vasta.

Tial: Laŭ via persono prijuĝu personon de alia.

Laŭ via familio juĝu familion de aliaj.

Laŭ via komunumo prijuĝu komunumon de aliaj.

Laŭ via lando prijuĝu landon de aliaj.

Laŭ via mondo prijuĝu mondon de aliaj.

Kiel mi scias la staton de l' mondo?

Ĝuste per la supre dirita.

## Rimarkoj pri 54

### Rimarkoj de Anniespera

La vorto „plantita“ eble ne estas taŭga, en la originalo la vorto „*jian*“ (fonetike) kredeble signifas „starigo“. Simila estas „elŝirita“: en la originalo la vorto „*ba*“ (fonetike) havas multajn sencojn, „elŝirita“ ja estas unu el ili, sed ĉi tie ĝia senco plejeble estas „ŝanceliĝi“.

Vd. de Wang Chongfang:

„Tiu, kiu estas lerta en starigo, ne ŝanceliĝas;

„Tio, kio bone estas firmitenata, ne forglitos.“

Laŭ la originalo, en via esprimo, la subjekto kaj objekto mislokiĝis unu al la alia. Simila ankaŭ la unua frazo.

Vd. de Wang Chongfang:

„Tiu, kiu estas lerta en tenado, perdas nenion.

Tiu, kiu formas sian personon, ties vivo fariĝas vera.

Tiu, kiu formas sian familion, ties vivo fariĝas plena.

Tiu, kiu formas sian komunumon, ties vivo kreskos.

Tiu, kiu formas sian landon, ties vivo fariĝas riĉa.

Tiu, kiu formas la mondon, ties vivo fariĝas vasta.“

En la supraj kvin frazoj ekzistas du problemoj komunaj: Pri „formas“: en la originalo la vorto „*xiu*“ (fonetike) ĉi tie signifas „praktiki“ anstataŭ „formas“, kaj ĝia objekto estas „*zhi*“ (fonetike), kiu signifas „ĝi.“

## 55

Kiu firmtenas la tutan VIVO-n,  
tiu similas al novnaskita infaneto:  
Venenaj serpentoj ne mordas ĝin.  
Sovaĝaj bestoj ĝin ne kaptas.  
Rabobirdoj ne bekpuŝas ĝin.  
Ĝiaj ostoj estas malfortaj, ĝiaj tendenoj softaj,  
kaj tamen ĝi firme povas mankapti ion.  
Ĝi ankoraŭ ne scias ion pri geedzoj,  
kaj tamen viglas ĝia sango,  
ĉar ĝi havas la tutan semon.  
Ĝi povas krei dum la tuta tago,  
kaj tamen ĝia voĉo ne fariĝas raŭka,  
ĉar ĝi havas la tutan pacon.  
Ekkoni la pacon signifas esti eterne.  
Ekkoni la eternecon signifas pensi ĝuste.  
Pliigi la vivon oni nomas feliĉo.  
Por siaj deziroj uzi siajn fortojn, oni nomas esti forta.

Se la aĵoj fariĝis fortaj, tiukaze ili maljuniĝas.

Ĉar tio estas kontraŭ-TAŬO.

Kaj kontraŭ-TAŬO estas proksime de la fino.

## **Rimarkoj pri 55**

### **Rimarko de Anniespera**

Vilhelmo:

„Ĝi ankoraŭ ne scias ion pri geedzoj,  
kaj tamen viglas ĝia sango,  
ĉar ĝi havas la tutan semon.“

Laŭ la originalo miaopinie la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„Kiu scias ankoraŭ nenion pri la koito de masklo kaj femalo,  
sed kies seksa membro povas spontanee erektiĝi,  
Ĉar en li la vitala forto estas je sia kulmino;“

### **Rimarko de Cezar**

Mi relernis kaj memoris el tiu artikolo antaŭ ĉio tion, ke forto estas pli ol nur fizika forto. La vivforto de bebo estas pli granda ol tiu de plenkreskulo. Krome Laocio konsilas, ke ni firmtenu la vivon. La tasko de vivanto estas vivi, ne esti vivante jam morta. Kiam ni estos mortaj, ni havos sufiĉe da tempo por esti mortaj.

## 56

La scianto ne parolas.

La parolanto ne scias.

Oni fermu sian buŝon

kaj fermu siajn pordojn,

oni obtuzigu sian sagacon,

malnodigu siajn konfuzajn pensojn,

moderigu sian lumon,

komunigu sian surteran.

Jen la kaŝinta komuneco nomata TAŬO.

Tiun, kiu havas ĝin,

oni nek povas influi per amo

nek per frido.

Nek per gajno nek per damaĝo.

Nek per pompo nek per malico.

Tial tiu estas la plej adorata surtere.



## **Rimarkoj pri 56**

### **Rimarkoj de Anniespera**

„Sagaco“ devus esti „akreco“ laŭ la originalo.

Vd. de Wang Chongfang:

„Malakrigi sian akrecon,“

„Surtera“ devus esti „polvo“ laŭ la originalo.

Vd. de Wang Chongfang:

„Miksiĝi kun la polvo“

### **Rimarko de Cezar**

Ke parolanto ofte eĉ ne scias, kion li parolas, estas drasta vero, koncernanta multajn homojn. Kutime homoj ja jam pensas, ke ili scias ion, se ili nur provas kompreni saĝulon. Pli da modesto efektive estus pli deca por ni ĉiuj, se temas pri la propra saĝo. Tiel certe pensis ankaŭ la filozofo Sokrato, kiu laŭsence diris, ke li scias nenion.

## 57

Por estri la ŝtaton oni bezonas regarton,  
por la armila metio oni bezonas  
eksterordinaran talenton.

Sed por gajni la mondon  
oni devas esti libera de agademo.

Kiel mi scias tion, ke tiel estas pri la mondo?

Ju pli da aferoj estas en la mondo,  
kiujn oni ne rajtas fari,  
des pli povriĝas la popolo.

Ju pli la homoj havas akrajn ilojn,  
des pli domo kaj ŝtato malboniĝas.

Ju pli la homoj flegas arton kaj ruzon,  
des pli leviĝas malbonaŭguraj signoj.

Ju pli da leĝoj kaj ordonoj pompas,  
des pli estas ŝtelistoj kaj rabistoj.

Tial parolas la saĝulo:

Se ni faras nenion,

tiukaze ŝanĝiĝos la popolo per si mem.

Se ni amas la kvieton,

la popolo per si mem fariĝos laŭorda.

Se ni entreprenas nenion,

la popolo fariĝos per si mem riĉa.

Se ni avidas nenion,

la popolo per si mem fariĝos simplanima.

## Rimarkoj pri 57

### Rimarkoj de Anniespera

„Regarto“ estas nepreciza vorto, ĉar en la originala teksto troviĝas tiu vorto, t.e. „*zheng*“ (fonetike), kiu signifas „normala maniero“. „Eksterordinara talento“ ne estas tre fidela al la originalo, ĉar en ĝi temas pri maniero, metodo, arto, sed ne pri talento mem.

Vd. de Wang Chongfang:

„La regno devas esti regata en normala maniero,  
La milito devas esti kondukata per eksterkutima taktiko,“

„*Qi wu*“ (fonetike) en originalo ne signifas „malbonaŭguraj signoj“, sed „strangaĵoj“.

Vd. de Wang Chongfang:

„Des pli da strangaĵoj estas inventitaj.“

„*Zi hua*“ en la originalo, ankaŭ laŭ Wang Chongfang ne signifas „ŝanĝiĝos“, sed „spontanee submetiĝas“.

## 58

Kies registaro estas kvieta kaj ne trudema,  
ties popolo estas sincera kaj honesta.

Kies registaro estas sagaca kaj rigora,  
ties popolo estas malica kaj nefidinda.

Estas la malfeliĉo sur kiu apogas sin la feliĉo.

La feliĉo estas tio, kiun embuskas la malfeliĉo.

Sed kiu ekkonas, ke ĝi estas la plej alta,  
se oni ne ordonas ion?

Ĉar alikaze la ordo ŝanĝiĝus en kapricojn,  
kaj la bona ŝanĝiĝas en superstiĉon.

La tagoj de la blindeco de la popolo  
daŭras ja vere longe.

Tial diras la saĝulo:

Li estas modela persono sen pritranci ion,

Li estas akurata, sen esti ofendema,

li estas aŭtentika sen arbitri,

li estas hela sen blindigi.

## Rimarkoj pri 58

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„Estas la malfeliĉo sur kiu apogas sin la feliĉo.

La feliĉo estas tio, kiun embuskas la malfeliĉo.“

Laŭ la originalo, ĉi tie ne temas pri tio, kio estas malfeliĉo kaj kio feliĉo, temas pri fakto, t.e., la feliĉo sin apogas sur malfeliĉo. Kaj la malfeliĉo sin kaŝas en feliĉo.

Vd. de Wang Chongfang:

„Ho malfeliĉo! La feliĉo sin apogas sur ĝi;

Ho feliĉo! La malfeliĉo sin kaŝas en ĝi.“

Vilhelmo:

„Tial diras la saĝulo;“

Laŭ la originala devus esti:

„Sed kiu ekkonas, ke ĝi estas la plej alta, se oni ne ordonas ion?“

Laŭ mia opinio la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza: „Kiu do povus antaŭvidi la lastajn rezultojn?“

Vilhelmo:

„Li estas modela persono sen pritrancî ion,  
Li estas akurata, sen esti ofendema,“

Pri tiuj ĉi frazoj, miaopinie la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„Tial, la Saĝulo estas kvazaŭ kvadrata sen anguloj  
Kaj havas kvazaŭ eĝojn, kiuj tranĉvundus neniun.“

### **Rimarkoj de Cezar**

Atentu, ke Laocio jam sciis, ke ekzistas ne nur bonaj regantoj, sed ankaŭ malbonaj. Kiu kortega filozofo kuraĝus diri tion? Li scias, ke malicaj regantoj kreas malicajn subigatojn. Li ne simple flate asertas, ke la popolo ĉiam estas bona, kaj li scias eĉ, ke la plej alta ordo en vero estas tiu, kiu tute ne bezonas reganton, denove tre moderna penso de Laocio, en kiu la anarkiisma penso pri tio, ke oni regu neniun kaj estu regata de neniun, fakte ĝerme jam estas formulita. Krome Laocio ne ŝatas minacajn montrofigojn

de instruistoj kaj arbitran regadon. Kion plu ni povus postuli de filozofoj, kiu vivis jam tre longe antaŭ la pli maljuna Pieter Brueghel. Tiu pentris la faman bildon, en kiu blinduloj kondukas blindulojn en fosaĵon, do blinda registaro blindan popolon.



## 59

Ĉe la gvidado de la homoj kaj ĉe l' servo al la ĉielo  
ne estas io pli bona ol limigo.

Ĉar nur per limigo oni frutempe povas trakti la aĵojn.

Per la frutempa traktado de l' aĵoj  
oni kolektas duoble la fortojn de l' VIVO.

Per tiuj duobligitaj fortoj de l' VIVO  
oni povas majstri ĉiun situacion.

Se oni povas majstri ĉiun situacion,  
neniu konas niajn limojn.

Se neniu konas niajn limojn,  
ni povas posedi la mondon.

Se oni posedas la patrinon de l' mondo  
oni gajnas eternan daŭradon.

Jen la SENCO de l' profunda radiko,  
de la firma grundo;  
de la terena estado  
kaj de l' daŭranta rigardado.

## Rimarkoj pri 59

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„ni povas posedi la mondon.“

En la originalo la vorto „guo“ (fonetike) ne signifas „mondon“, sed „regon“.

Vd. de Wang Chongfang:

„Kun la senmezura potenco oni povas regi regnon.  
Jen la SENCO de l' profunda radiko,“

En la originala teksto la „dao (fonetike)“ ne signifas „SENCO“, sed „metodo, rimedo, maniero.“

Ĉi tie ne temas pri „SENCO“. Laŭ mi la traduko de Wang Chonfang estas pli fidela al la originalo. Jen:

„Tio estas nomata „la profunda kaj firma plantado de la radikoj, —

Jen la maniero ĝui longan vivon kaj atingi eternan ekzistadon.“

## **Rimarkoj de Cezar**

La ĉapitro komenciĝas per tondra frapfrazo. La plej bona regado laŭ li estas limigita regado. Se oni pensas tion plu, estas neniu regado eble eĉ „la plej plej bona“ regado.

Wang Chonfang uzas por la vorto „limigo“ la vorton „avaro“. Jen lia klarigo, kial li faras tion: „La ĉefa ideo de tiu ĉi ĉapitro estas la principo de „avareco“. Tiu ĉi principo proponita de Laŭzi al la regantoj havas du signifojn: unue, uzi kiel eble modere materialojn kaj konservi ŝparitaĵojn; due, akumuli moralan forton aŭ la Virton. Por bone fari la regadon de la homoj kaj la servadon al la Ĉielo, la regantoj devus sekvi la principon de „avareco“, nome: domaĝi kaj ŝpareme uzi homfortojn kaj la materialojn de la popolo unuflanke kaj bridi siajn dezirojn je ekscesaj plezuroj aliflanke. Laŭ Laŭzi, se la regantoj tenus sin je la principo, ili povus ne nur triumfe venki ĉiajn obstaklojn, sed ankaŭ longedaŭrigi sian suverenecon. Ĉi-rilate oni ja povas diri, ke la principo de „avareco“ konkretigas la Taŭon de Laŭzi kaj ankaŭ lian principon de „senagado“.

## 60

Landon oni devas gvidi tiel,

kiel oni rostas fiŝetojn.

Se oni administras la mondon laŭ la TAŬO

jen la mortintoj ne rondiras kiel fantomoj.

Ne estas tiel, ke la mortintoj ne estas fantomoj,

sed iliaj spiritoj ne damaĝas la homojn.

Ne nur la fantomoj ne damaĝas la homojn,

ankaŭ la saĝulo ne damaĝas ilin.

Se do ambaŭ tiuj fortoj reciproke ne damaĝas sin,

tiukaze ili unuigas siajn vivfortojn en ilia efiko.

## Rimarkoj pri 60

### Rimarko de Anniespera

Vilhelmo:

„jen la mortintoj ne rondiras kiel fantomoj.

Ne estas tiel, ke la mortintoj ne estas fantomoj,

sed iliaj spiritoj ne damaĝas la homojn.

Ne nur la fantomoj ne damaĝas la homojn,“

Ĉi supraj tradukfrazoj, laŭ mi, estas malpli fidela al la originalo ol la traduko de Wang Chongfang:

„La fantomoj ne povas fari malutilon.

Tio estas ne tial, ke ili ne povas hanti,

Sed tial, ke ilia hantado ne povas esti malutila al la homoj;

Tio estas ne tial, ke ilia hantado ne povas esti malutila al la homoj,

## **Komento de Wang Chongfang**

„La regado de granda regno estas kiel fritado de fiŝeto“ estas unu el la famaj diroj de Laŭzi, kiuj vaste cirkulas. Ĝi figure montras, ke la regado de regno devas esti farata laŭ la principo de „senagado“, t.e. konforme al la Taŭo. Kiel oni ne devas ofte turnadi la tro delikatan fiŝeton dum fritado, tiel la regantoj ne devas ĝenadi la popolon per tro da trudaj ordonoj kaj severaj leĝoj. Se la regno estos regata laŭ la principo de „senagado“, tiam la popolo ĝuos trankvilecon kaj vivos pacan, feliĉan vivon, suferante nenian ĝenadon de la regantoj, nek de la fantomoj, ĉar tiam ili, la regantoj kaj la fantomoj, ĉiuj submetiĝos al la Taŭo.“

## 61

Per tio, ke granda regno orientiĝas kiel torento  
malsupren,  
ĝi fariĝas la unuiĝo de l' mondo.  
Ĝi estas la ineca de l' mondo.  
La ineca venkas ĉiam la virecan  
pro ties kvieto.  
Pro ties kvieto ineca tenas sin malsupre.  
Se la granda regno tiel submetas sin al la malgranda,  
ĝi gajnas per tio la malgrandan regnon.  
Se la malgranda submetas sin al la granda,  
ĝi gajnas per tio la grandan.  
Tiel unu el la regnoj per tio, ke ĝi submetas, gajnas,  
kaj la alia per tio, ke ĝi submetas sin, gajnas.  
La granda regno celas nenion alian  
krom unuiĝi kaj nutri la homojn.  
La malgranda regno celas nenion  
krom partopreni je la priservado de la homoj.

Tiel atingas ĉiu regno tion, kion ĝi celas;  
sed la granda devas resti sube.



## Rimarkoj pri 61

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„Ĝi estas la ineca de l' mondo“

Laŭ la originalo:

„Ĝi estas kiel la ineca de l' mondo.“

Vilhelmo:

„Per tio, ke granda regno orientiĝas kiel torento malsupren, ĝi fariĝas la unuiĝo de l' mondo.“

En la originalo la vorto „jiao“ (fonetike) ne signifas „unuiĝo“, sed „konverĝo.“

Pri tiuj ĉi superaj frazoj, laŭ mi, la traduko de Wang

Chongfang estas pli preciza:

„La granda regno devas esti kvazaŭ ĉe la malsupra baseno de rivero, al kiu fluas iuj riveretoj;

ĝi devas esti tia loko, al kiu konver as io sub la ĉielo,“

Vilhelmo:

„Tiel unu el la regnoj per tio, ke ĝi submetas, estas gajnata, kaj la alia per tio, ke ĝi submetas sin, gajnas.

Laŭ mi, la originalo diras, ke tiu, kiu sin submetas, gajnos.

Vd. el Wang Chongfang:

„Jen kial granda regno, metante sin sub malgrandajn regnojn, igas la malgrandajn apogi sin sur ĝi.

Malgrandaj regnoj povas, metante sin sub grandan regnon, akiri ties fidon.“

### **Rimarkoj de Cezar**

Kiel funkcias komuneco? Jen konata demando. Ĉu per tio, ke ĉiuj estas samaj, kiel oni ofte spontane supozas, aŭ per diplomata kunagado, do per reciproke avantaĝa kunlaboro, kiu eĉ kapablas glatigi klasdiferencojn dum certa tempo? Nu, la lasta vojo certe estas pli sukcespromesa en mondo, kiu ankoraŭ tute ne estas egala. Grandaj regnoj ĝuste tiom longe ekzistis, ĉar la grandaj regnoj siajn diversajn popolojn ne nur subigis, sed efektive civilizis, do kunigis kaj unuecigis. La plej sukcesa regno tiurilate certe estis Ĉinio,

sed ankaŭ la romanianoj estis tre sukcesaj, ĉar la imperiestroj kaj oficistoj de tiuj imperioj sciis, ke oni ne nur povas postuli tributojn de la subigitaj popoloj, sed ke oni samtempe devas eduki kaj gardi ilin. Do kulture kaj ekonomie enplekti ilin en la grandan imperion. Prudenta politiko estas antaŭ ĉio eterna ekvilibro de diversaj fortoj. Laocio ne estis homo, kiu estis preta fiere kuri kun antaŭŝovita kapo tra dika muro. Li agis pli saĝe, laŭ la devizo, ke ŝtonaj monumentoj kaj tutaj regnoj venkeblas ankaŭ kvazaŭ per mola akvo, per tio, ke oni tiom longe cirkaŭfluas ilin, ĝis ili iam kvazaŭ per si mem kunrompiĝos.

## 62

TAŬO estas la hejmlando de ĉiuj,  
kaj la trezoro de la homoj bonaj,  
kaj la protekto de la homoj nebonaj.  
Kun belaj vortoj oni povas prezenti sin foirplace.  
Per honorinda konduto  
oni povas distingi sin de aliaj.  
Sed kial oni forĵetu  
la nebonajn el la homoj?  
Tial la reganto estas nomumita,  
kaj la princoj havas sian oficon.  
Eĉ, se oni havus sceptrojn el juveloj,  
por sendi ilin en festa kvarĉevala ĉaro,  
ili ne valorus tiom, kiom la donaco TAŬO,  
surgenu prezentata al la reĝo.  
Kial la malnovuloj tiom ŝatis Taŭnon?  
Ĉu ne estas tial, ĉar oni diras pri ĝi:  
„Kiu petas, tiu ricevas;

kiu pekas, al tiu oni pardonas?“

Tial ĝi estas la plej granda delikataĵo surtere.

## Rimarkoj pri 62

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„kaj la trezoro de la homoj bonaj,  
kaj la protekto de la homoj nebonaj.“

En la originalo, la vorto „*bao*“ (fonetike) havas kelkajn sencojn, ekz. protekti, konservi kaj tiel plu. Ĉi tie, laŭ mi, ĝi signifas „konservi.“ Vd la tradukon de Wang Chongfang:

„Kaj ĝi devas esti konservata ankaŭ de malbonuloj.“

Vilhelmo:

„Kun belaj vortoj oni povas prezenti sin foirplace.  
Per honorinda konduto  
oni povas distingi sin de aliaj.“

Laŭ mi, pri tiuj ĉi frazoj, la traduko de Wang Chongfang estas pli fidela al la originalo:

„Per belaj paroloj oni povas akiri respekton de aliaj, Kaj per bonaj agoj oni povas doni al aliaj sekvindan ekzemplon.“

Vilhelmo:

„Sed kial oni forĵetu la nebonajn el la homoj?“

Pri tiu ĉi frazo, mi opinias, ke la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza. Jen:

„Kiel do la Taŭo povus esti forĵetita de homoj, eĉ en iliaj malbonaj agoj?“

Vilhelmo:

„por sendi ilin en festa kvarĉevala ĉaro,“

En la originalo ekzistas tiuj ĉi vortoj: „*xian, hou*“ (fonetike), kiuj signifas respektive: „antaŭ, malantaŭ“, sed ne ekzistas la vorto „en“. Laŭ mi ĉi tie la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza: „donace sendi jadodiskon, sekvatan per jungitaro el

kvar ĉevaloj.“

Vilhelmo:

„ili ne valorus tiom, kiom la donaco TAŬO,  
surgenue prezentata al la reĝo.“

Sciu, ne nur al reĝo, sed ankaŭ al la princoj.

Vilhelmo:

„Kial la malnovuloj tiom ŝatis Taŭon?

Ĉu ne estas tial, ĉar oni diras pri ĝi:

Kiu petas, tiu ricevas;

kiu pekas, al tiu oni pardonas?

Tial ĝi estas la plej granda delikataĵo surtere.“

En la originalo, la vorto „*gui*“ (fonetike) signifas „valora,  
aŭ esti rigardata grava“, sed ne „delikata.“

Vd. de Wang Chongfang:

„Jen kial ĝi estas alte ŝatata de ĉiuj sub la Ĉielo.“



## 63

Tiu, kiu ekzercas la neagadon,  
kiu okupas sin kun la senokupeco  
kaj trovas guston je tio, kio ne bongustas,  
vidas la grandan en la negranda kaj la multan  
en la malmulta.

Li repagas grumblon per VIVO.

Planu la malfacilan tiam, kiam ĝi estas facila ankoraŭ!

Faru la grandan tiam, kiam ĝi estas malgranda ankoraŭ!

Ĉio malfacila surtere komenciĝas ĉiam kiel facila.

Ĉio granda surtere komenciĝas ĉiam kiel malgranda.

Tial la saĝulo faras neniam ion grandan,  
tiel li povas perfektigi siajn grandajn agojn.

Tiu, kiu facile promesas ion,  
certe ne malofte rompas la promeson.

Kiu traktas multajn aferojn facilanime,  
tiu certe havas multajn malfacilaĵojn.

Tial, ĉar la saĝulo pripensas la malfacilaĵojn,

li havas ilin neniam.

## Rimarkoj pri 63

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„Tiu, kiu ekzercas la neagadon,  
kiu okupas sin kun la senokupeco  
kaj trovas guston je tio, kio ne bongustas,  
vidas la grandan en la negranda kaj la multan en la  
malmulta.

Li repagas grumblon per VIVO.“

Pri tiuj ĉi frazoj, en Ĉinio la pli komuna kompreno estas tiel  
(cititaj el la traduko de Wang Chongfang):

„Rigardu „senagadon“ kiel agon,  
Senaferecon kiel aferon,  
Sengustecon kiel guston.

Kiel ajn malamikaj kontraŭ mi aliaj estas,  
Mi ĉiam repagas al ili per „Virto“.

## 64

Kio ankoraŭ estas trankvila, tio facile kapteblas.

Kio ankoraŭ ne aperis, facile pripenseblas.

Kio ankoraŭ estas delikata, facile rompeblas.

Kio ankoraŭ estas malgranda, facile disŝuteblas.

Oni devas efiki tion, kio ankoraŭ ne ekzistas.

Oni devas ordigi tion, kio ankoraŭ ne estas konfuza.

Arbo kun amplekso de du metroj

ekestas el hararsimila tigo.

Naŭ etaĝojn alta turo

ekestas el monteto da tero.

Mil mejlojn longa vojaĝo

komenciĝas antaŭ viaj piedoj.

Kiu agas, fuŝas ion.

Kiu firmtenas ion, perdas tion.

Tial tiel estas ankaŭ pri la saĝulo.

Li ne agas, tial li ne fuŝas ion.

Li firmtenas nenion, tial li ne perdas ion.

La homoj okupas sin pri siaj aferoj,  
kaj ĉiam, kiam ili preskaŭ pretas,  
ili fuŝas la aferon.

Oni atentu pri la fino same tiel, kiel pri la komenco,  
tiukaze ne ekestas fuŝoj.

Tial tiel estas ankaŭ pri la saĝulo:

Li deziras sendezirecon.

Li ne ŝatas malfacile akireblajn posedojn.

Li lernas la nelernadon.

Li returnas sin al tio, kion preteriras la amaso.

Tial li kreskigas la naturan kuradon de la aĵoj  
kaj ne arogas al si agi.

## Rimarkoj pri 64

### Rimarkoj de Anniespera

Pri „malgranda“: En la originala teksto, la vorto „*wei*“ (fonetike) ĉi tie signifas ne nur „malgranda“, sed „tre tre malgranda.“

Pri „disŝuteblas“: En la originala teksto la vorto „*san*“ (fonetike) signifas „esti dispecetigita“. Vd. la tradukon de ĉi tiu frazo de Wang Chongfang:

„Tio, kio estas tre malgranda, estas facile dispecetigebla.“

Pri „amplekso de du metroj“: en la originalo ne ekzistas la preciza mezuro, nur esprimo per la komparo „*he bao*“ (fonetike), kiu laŭvorte signifas „ĉirkaŭi per la du brakoj“.

Pri „mejlojn“: En Ĉinio la nacia mezurunuo pri distanco estas „*li*“ (fonetike).

Pri „antaŭ viaj piedoj“: En la originala teksto, la vorto „*zu xia*“ (fonetike) laŭvorte ja signifas „viaj piedoj“, sed ĉi tie ĝi signifas „la unua paŝo“. Vd. de Wang Chongfang:

„Vojaĝo de mil *li*-oj komenciĝas per la unua paŝo.“

## Rimarkoj de Cezar

„Mil mejlojn“ (laŭ Anniespera: *li-ojn*) „Longa vojaĝo komenciĝas antaŭ viaj piedoj.“ Frazo, kiu akompanas min jam dum multaj jaroj. Tial mi havas neniam problemojn ekagi. Sed mi devas ankoraŭ pli atenti pri tio, ke „oni atentu pri la fino same tiel, kiel pri la komenco“, ĉar tial ne ekestos fuŝago.

Interesa afero eble estas ankaŭ, ke germanoj en la ĉiutaga vivo uzas la frazon: „Kiu ne faras ion, tiu ne povas fuŝi ion“, preskaŭ nur moke, nur negative, por motivigi pigrumadon ks. La pozitivan enhavon oni ĉe tio apenaŭ pripensas.

Simile estas pri la tri famaj simioj el Japanio, kiuj intence ne aŭdas ion kaj ne vidas danĝeran aŭ malutilan kaj ne parolas pri tio, kio povus esti damaĝa al ili. Tion germanoj kutime miskomprenas kiel nuran malkuraĝan neagadon. Sed ankaŭ tiu – ofte necesa – neagado pozitive interpreteblas kaj do havas pozitivan flankon.

Tiel ankaŭ la neagado de Laocio facile misinterpreteblas, se oni tro rigore rigardas lian devizon de l' neagado. Ĉar ankaŭ



trinkado kaj manĝado estas agoj; tiu, kiu tute ne plu agas,  
mortus post kelkaj tagoj. Sed tion Laocio kompreneble ne  
celis.

## 65

Tiuj, kiuj en malnovaj tempoj estis kapablaj  
en la agado laŭ la TAŬO,  
ne faris tion per klerigo de la popolo,  
sed per tio, ke ili tenis la popolon malklera.  
Ke la popolo malfacile gvideblas,  
havas la kaŭzon, ke ĝi scias tro multe.

Tial tiu, kiu per sciado gvidas la regnon,  
prirabas la regnon.

Tiu, kiu ne gvidas ĝin per sciado,  
feliĉigas la regnon.

Tiu, kiu scias ambaŭ aferojn, havas idealon.

Ĉiam koni idealon estas kaŝita VIVO.

Kaŝita VIVO estas profunda, vaste efika,  
alia ol ĉiuj aĵoj;

sed laste ĝi efikas kaj kaŭzas  
la grandan sukcesadon.

## **Rimarkoj pri 65**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Vilhelmo:

„Kaŝita VIVO estas profunda, vaste efika,

alia ol ĉiuj aĵoj;

La mistera Virto estas tre profunda kaj longedaŭra.“

En la originalo la vortoj „fan“ (fonetike“ signifas „mala, kontraŭa“, sed ne „alia“ Vd. de Wang Chongfang:

„Ĝi estas kontraŭa al la naturo de konkretaj aferoj,“

### **Rimarkoj de Cezar**

Ŝajnas al mi, ke tio eble estas parte falsita ĉapitro, kiun Laocio ne vere verkis tiel. En aliaj ĉapitroj Laocio atakas la hipokritecon de artistoj kaj de saĝuloj, ankaŭ troigitajn lertojn kaj sciojn, sed ne la saĝecon mem. Alia kaŭzo eble estas, ke oni iel „devigis“ la majstron spite al pli bona scio skribi tiun ĉapitron, kvankam Laocio certe sciis ĝin pli bone.

Nu, ni havas ankaŭ tiun „problemeton“, ke ni rigardas

Laocion el multe pli moderna perspektivo, jam tra la okulvitroj de la epoko de l' klerigo en Eŭropo. Tial tiu ĉi ĉapitro kun obskuraj imagoj estas eĉ pli suspekta al ni. Sed ni ne forgesu, ke Laocio ne povis koni la epokon de l' klerigo, li vivis en tute alia tempo, en kiu eble ankoraŭ neniu krom Konfucio laŭsence parolis publike pri tio, ke la edukiteco de la popolo estas decida mezurilo por la grado de la civiliziteco de tuta popolo. Tial ne plaĉas al mi, ke Rikardo Vilhelmo tradukas helpe de la vorto „klerigo“. Tiu nocio ne ekzistis en la tempo de Laocio. Oni ne subŝovu al teksto fonon, kiun ĝi ne povis havi ankoraŭ.

### **Komento de Wang Chongfang**

„Tiu ĉi ĉapitro proponas, ke oni ne devas regi la regnon per „saĝeco“. Laŭ Laŭzi, regi la regnon per saĝeco estas por la regno katastrofo; kontraŭe, regi la regnon ne per saĝeco kaj lasi la popolon en senklereco estas por la regno feliĉo. Tio faras la impreson, ke Laŭzi kvazaŭ estas por la politiko de obskurantismo, sed efektive ne estas tiel. En la ĉapitro 18 Laŭzi skribas: „Kiam inteligenteco kaj saĝeco aperas, / Granda hipokriteco ilin sekvas.“ Tio montras, ke en

efektiveco Laŭzi kontraŭstaras ne al saĝeco mem, sed al hipokriteco kaj artificeco. La ideala socio, laŭ Laŭzi, devus esti tia, en kia la reganto kaj liaj regatoj ne plu uzus „saĝecon“ kaj ambaŭ revenus al simplanimeco, kiel priskribite en la asta parto de la ĉapitro 57.)“

## 66

Ke riveroj kaj maroj estas la reĝoj de ĉiuj riveretoj,  
okazas tial, ĉar ili bone povas teni sin malsupre.

Tial ili estas la reĝoj de ĉiuj riveretoj.

Tiel estas ankaŭ la saĝulo:

Se li volas stari super siaj homoj,  
li metas sin en siaj paroloj sub ilin.

Se li volas esti antaŭ ili,  
li starigas sin kiel persono malantaŭe.

Tiel estas ankaŭ,  
kiam la saĝulo restadas en la alto,  
tiukaze la homoj ne estas ŝarĝataj de li.

Kiam li restadas en la plej alta rango,  
li tamen ne ofendas la homojn

Tiel ankaŭ  
la tuta mondo ne malvoleme metas lin antaŭen.

Kaj ĝi ne fariĝas malvolema.

Ĉar li ne kverelas,

neniu en la tuta mondo povas kvereli kun li.

## Rimarkoj pri 66

### Rimarkoj de Anniespera

En la originalo, la vorto „*zheng*“ (fonetike) signifas „konkuri“, sed ne „kvereli“.

Vd. de Wang Chongfang:

„Kaj ĝuste ĉar Li ne konkuras kontraŭ aliaj,

Neniu sub la Ĉielo povas konkuri kontraŭ Li.“

### Rimarkoj de Cezar

Ĉiu el ni konas tiajn nekonkuremajn homojn, ni ĉiuj tre ŝatas ilin. Kaj tamen nur malmultaj el ni agas tiel kiel ili. Sed kial? Kiu diablo nin rajdas? Kial ni kverelas ĉeokaze, kvankam ni scias, ke kvereloj estas tute sensencaj, ja eĉ kontraŭproduktivaj? Tion eble nur tre bona psikologo povus klarigi. Cetere, longtempe post Laocio ankaŭ Jesuo Kristo asertis, ke la lastaj estos la unuaj.



## 67

Ĉiuj en la mondo diras, ke mia TAŬO estas ja granda,  
sed kvazaŭ neuzebla.

Ĝuste tial, ĉar ĝi estas tiom granda,  
ĝi estas kvazaŭ neuzebla.

Se ĝi estus uzebla,  
ĝi delonge estus fariĝinta malgranda.

Mi havas tri trezorojn,  
kiujn mi ŝatas kaj konservas.

Unu el ili estas: la amo;  
la dua nomiĝas ŝparemo.

La tria estas ne kuraĝi stari en la mondo antaŭe.

Pro la amo oni povas esti kuraĝa,  
pro ŝparemo oni povas esti malavara.

Se oni ne kuraĝas anstaŭstari en la mondo,  
oni povas esti la kapo de la pretaj homoj.

Se oni nun volas esti kuraĝa sen la amo,  
se oni nun volas esti malavara sen ŝparemo,

se oni nun volas antaŭeniĝi sen stari malantaŭe,  
tio estas mortiga.

Se oni havas amon en la batalo,  
oni venkas.

Se oni havas ĝin ĉe la defendo,  
oni estas nevenkebla.

Tiun, kiun la ĉielo volas savi,  
ĝi gardas per la amo.

## Rimarkoj pri 67

### Rimarkoj de Anniespera

„Ĉiuj en la mondo diras, ke mia TAŬO estas ja granda, sed kvazaŭ neuzebla.“

Pri tiu ĉi frazo, la plej akceptita kompreno en Ĉinio estas tia (*citita el la traduko de Wang Chongfang*):

„Sed ĝi ne estas kiel io ajn konkreta.“

Vilhelmo:

„Se oni nun volas esti kuraĝa sen la amo,“

En originalo la vorto „*jin*“ (fonetike) signifas „hodiaŭ, nuntempe“, anstataŭ „se“.

Vilhelmo:

„Se oni havas ĝin ĉe la defendo, oni estas nevenkebla.“

En originalo la vorto „*gu*“ (fonetike) signifas „plifortiĝi“, anstataŭ „esti nevenkebla“.

## 68

Tiu, kiu bone kapablas gvidi,  
ne estas militema.

Tiu, kiu bone kapablas batali,  
ne estas kolera.

Tiu, kiu bone kapablas venki la malamikojn,  
ne batalas kontraŭ ili.

Tiu, kiu bone kapablas uzi la homojn,  
restadas malsupre.

Jen la VIVO, kiu ne konkuremas;

jen la forto por la uzado de la homoj.

Jen la poluso, kiu etendiĝas ĝis la ĉielo.

## **Rimarkoj pri 68**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Vilhelmo:

„Jen la VIVO, kiu ne konkuremas;

jen la forto por la uzado de la homoj.

Jen la poluso, kiu etendiĝas ĝis la ĉielo.“

La suprajn tri frazojn en Ĉinio oni komprenas plej ofte tiel,  
kiel Wang Chongfang tradukis ilin:

„Tio estas nomata la Virto de nekonkuro;

Tio estas nomata la kapablo uzi alies forton;

Tio estas nomata la konformiĝo al la plej alta leĝo de la  
Ĉielo.“

### **Rimarko de Cezar**

Ĉu Laocio jam povis scii, kio estas poluso? Mi iom dubas pri  
tio kaj pensas, ke la uzita esprimo estas de Rikardo  
Vilhelmo, sed ne de Laocio. (cez)

### **Anniespera respondis**

Jes, vi pravas. En la originalo la vorto „*ji*“ (fonetike) signifas „la plej“, anstataŭ „poluso“. Ĉi tie Laocio alludas „la plej altan leĝon.“

## 69

Ĉe la soldatoj oni diras:

„Mi ne kuraĝas agi kiel mastro,  
sed prefere kiel gasto.

Mi ne kuraĝas antaŭenpaŝi eĉ unu colon,  
sed prefere retiras piedon je futo.“

Tio estas iri sen gamboj,  
skermi sen brakoj,  
ĵeti sen ataki,  
konservi sen uzi armilojn.

Ne ekzistas pli granda malfeliĉo  
ol subtaksi la malamikon.

Se mi subtaksus la malamikon,  
mi elmetus min al la danĝero perdi miajn trezorojn.  
Tie, kie du armeoj batalante kunpusiĝas,  
venkos tiu, kiu batalas pezkore.

## Rimarkoj pri 69

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„Tio estas iri sen gamboj,  
skermi sen brakoj,  
ĵeti sen ataki,  
konservi sen uzi armilojn.“

Tiujn suprajn frazojn oni komprenas en Ĉinio kutime tiel  
(citita laŭ Wang Chongfang):

„Tio estas nomata:

Disaranĝo de neniam trupoj en batalordo,  
Levo de neniam brakoj,  
Alfrontado de neniam malamikoj,  
Tenado de neniam armiloj.“



## 70

Miaj vortoj facile kompreneblas,  
facile praktikeblas

Sed neniu surtere povas kompreni ilin,  
povas agi laŭ ili.

La vortoj havas originon.

La agoj havas mastron.

Ĉar oni ne komprenas ilin,  
oni ne komprenas min.

Sed ĝuste je tio, ke mi estas komprenata tiel malofte,  
oni ekkonas mian valoron.

Tial la saĝulo iradas en kruda vesto,  
sed ankore li portas juvelon.

## **Rimarkoj pri 70**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Vilhelmo:

„Sed ĝuste je tio, ke mi estas komprenata tiel malofte, oni ekkonas mian valoron.“

Laŭ mi la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„Tiu, kiuj min komprenas, estas tre malmultaj,  
Kaj tiuj, kiuj povas min sekvi, estas apenaŭ troveblaj.“

En la originalo la vorto „ze“ (fonetike) havas kelkajn sencojn, kaj ĉi tie ĝi signifas „sekvi“, anstataŭ „ekkonas.“

### **Rimarkoj de Cezar**

Kiom da instruistoj jam plendis kiel li? La ŝercema poeto Heine laŭdire staris iam en literaturkluba vespero kun la fama filozofa Hegel en angulo ĉe fenestro kaj diris al Heine: „Iam mi havis lernanton, kiu komprenis min.“ Tiam la granda filozofa silentis dum kelkaj sekundoj kaj poste aldonis: „Sed ankaŭ tiu ne vere komprenis min.“

Miskomprenateco ŝajne estas la neevitebla sorto de grandaj pensuloj. Kaj ankaŭ la plej fama lernanto de Hegel, Karlo Markso, kiu ekzemple moke diris, ke li ne estas marksisto, plendis ofte, ke oni komprenas lin ne ĝuste. Cetere, Hegel estis aĉe pagata instruisto en la prusa universitato en Berlino. Li devis bone kalkuladi por povi vivi de sia salajro. Ankaŭ tion Laocio eble spertis simile, ĉar li evidente vestis sin modeste.

## 71

Scii la nesciecon,

tio estas la plej alta.

Ne scii, kio estas scio, estas suferado.

Nur, se oni suferas tiun suferadon,

oni liberigas sin de la suferado.

Ke la saĝulo ne suferas,

kaŭzas tio, ke li suferas tiun suferadon;

tial li ne suferas.

## Rimarkoj pri 71

### Rimarkoj de Anniespera

Kara Cezar, mi devas konfesi, ke tiu ĉi traduko, laŭvorte, estas tre fidela al la originalo. Tial ĝi estas tre pensiga, ankaŭ tre malfacile komprenebla. En Ĉinio oni kutime ĝin komprenas tiel, kiel la tradukon de Wang Chongfang:

„Scii, ke oni mem ne scias, estas plej bone;

Pretendi scii, kion oni mem ne scias, estas terura manko.

Nur tiu, kiu rekonas tian mankon kiel mankon,

Povas esti libera de tia manko.

La Saĝulo estas libera de ĉiaj mankoj,

Ĉar Li rekonas la mankojn kiel mankojn.

Jen kial Li estas liberaj de ĉiaj mankoj.“

### Rimarkoj de Cezar

Mi tuj devis pensi en **Rimark** tiu ĉi ĉapitro pri la serena

Sokrato, kiu laŭdire asertis: Mi scias, ke mi scias nenion.

Ĝuste se tio okazas al mi, ke mi tuj devas pensi pri iu alia

pensulo aŭ citaĵo mi fariĝas tuj misfidema kaj mi ekpensas:

Ĉu tio estas ankoraŭ la origina Laocio aŭ jam „modernigita“ Laocio? Rikardo Vilhelmo bedaŭrinde ne estas tute libera de la tento esprimi sin en siaj tradukoj ĉeokaze iom tro alludeme, tiel ke oni devas ekpensi ankaŭ pri aliaj pensuloj. Povas esti ke la rekonataj tradukmanieroj en la tempo de Vilhelmo ankoraŭ permesis aŭ eĉ postulis tion. Sed nun oni sentas sin verŝajne kutime ĝenata, se oni havas tiajn tion-mi-jam ie legis-momentojn dum la legado de traduko tro ofte.

## 72

Se la homoj ne timas la teruron,  
tiukaze venos la granda teruriĝo.

Ne faru malvasta ilian loĝejon  
kaj ne mizera ilian vivon.

Ĉar nur per tio, ke ili ne vivas en malvasto,  
ilia vivo ne fariĝos mizera.

Tiel agas ankaŭ la saĝulo:

Li ekkonas sin mem, sed ne volas brili.

Li amas sin mem, sed ne serĉas honoron por si mem.

Li forigas la alian kaj prenas ĉi tion.

## **Rimarkoj pri 72**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Vilhelmo:

„Ĉar nur per tio, ke ili ne vivas en malvasto,  
ilia vivo ne fariĝos mizera.“

La originala teksto tre malfacile kompreneblas. Tial mi ne scias kiu traduko de la du frazoj estas pli fidela al la originalo, ĉu tiu de Vilhelmo, ĉu tiu de Wang Chongfang?

Vd. de Wang Chongfang:

„Nur ne subpremante la popolon,  
Vi povas sentigi al ili nenian subpremon.“

### **Rimarkoj de Cezar**

Tiu ĉapitro estas kvazaŭ la baza fundamento de ĉiu homafabla sociologio:

1. La respondeculoj kaj ni mem traktu la homojn bone, tial ni ne metu ilin en malvastajn kaĝojn kiel bestojn.



2. Se ni ĉiuj tiel agas, la homoj fariĝos ne-mizeruloj kaj ekĝuos la vivon.

3. Ni mem amu nin, sed ne tro kaj ne koste de la aliaj,

4. Ni rezignu pri tro da lukso kaj kontentiĝu prefere pri tio, kion havas ĉiu.

La germana karikaturisto Zille, kiu pentris antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj, ofte pentris kaj desegnis bildojn pri la mizero de la proletaro en Berlino, ofte kun nekutime sarkasmaj komentoj, per sprita aforismo tre koncize esprimis la saman kiel Laocio: „Oni povas mortbati homon per loĝejo same tiel bone, kiel per hakilo.“

## 73

Tiu, kiu bravas kiel aŭdaculo,  
pereas.

Tiu, kiu bravas sen aŭdaco,  
restas vivanta.

El ambaŭ specoj unu maniero ricevas gajnon,  
kaj la alia damaĝon.

Sed kiu povus scii, kial ĈIELO  
malamas iun?

Tiel ankaŭ estas la saĝulo:

Li scias malfacilaĵojn.

La TAŬO de l' ĈIELO ne konkuras  
kaj tamen sukcese venkas.

Ĝi ne parolas

kaj tamen ĝi trovas bonan respondon.

Ĝi ne mansvingas,

kaj tamen ĉio venas per si mem.

Ĝi estas malstreĉita

kaj tamen ĝi bone planas.

La ĈIELO-reto estas tute maldensa,

sed ĝi perdas nenion.

## **Rimarkoj pri 73**

### **Rimarko de Anniespera**

Laŭ Anniespera Laocio ne uzas la esprimon „kverelas“, germane „streiten“ ĉe Vilhelmo, sed „konkuri“.

### **Rimarkoj de Cezar**

Mi do tradukis ĝin tiel, ĉar „kvereli“ kaj „konkuri“ sinonime rigardate estas tre similaj. Tamen „kvereli“ havas negativan flankon, kaj „konkuri“ estas pli sobra esprimo. Mia tasko kompreneble estas – tion oni ne forgesu eĉ dum sekundo – traduki Rikardo Vilhelmon kaj ne la originalan tekston de Laocio. Tial mi tradukas laŭ Vilhelmo ankaŭ tiukaze, se tiu evidente eraras. La rimarkoj de Anniespera ja atentigas pri tio, kio ne estas en ordo, kaj tiel la legantoj ricevas pluan eblon proksimiĝi al la originalo. Wang Chongfang tradukis Laocion bonege, sed de tempo al tempo tradukas Vilhelmo estetike eĉ iom pli bone ol li. Do ambaŭ tradukoj havas sian valoron. Vilhelmo montras unuavice kiel oni konas Laocion en Eŭropo kaj Wang Chongfang, la ĉino, estas sendube pli proksima al la originalo ol Vilhelmo.

Ekzemple la duan parton de la ĉapitro tradukas Wang Chongfang pli bone kaj eĉ multe pli elegante:

„Estas la Taŭo de la Ĉielo,  
Kiu ne batalas kaj tamen lerte gajnas venkon,  
Kiu ne parolas kaj tamen lerte faras respondon,  
Kiu, kvankam ne vokite, venas propramove,  
Kiu, kvankam malrapide, lerte planas.  
Vasta estas la reto de la Ĉielo,  
Kaj grandaj estas ĝiaj maŝoj, sed ĝi lasas al nenio ilin  
trairi.“

### **Plua rimarko de Anniespera**

Ŝi proponis uzi la esprimon „maldensa reto“. Kaj mi volonte akceptis tion. (cez)

## 74

Se la homoj ne timas la morton,  
kiel do timigi ilin per la morto?  
Sed, se mi tenus la homojn  
ĉiam en mortotimo kaj,  
se iu farus ion strangan,  
ĉu mi kaptu kaj mortigu tiun?  
Kiu kuraĝus fari tion?  
Estas ĉiam iu mortopotenco, kiu mortigas.  
Mortigi anstataŭ tiu mortopotenco, tio estas  
kvazaŭ oni prenas hakilon  
anstataŭ ĉarpentisto.  
Tiu, kiu prenas la hakilon  
anstataŭ la ĉarpentisto,  
malofte elturniĝas  
sen vundi siajn manojn.

## Rimarkoj pri 74

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„Ĉu mi kaptu kaj mortigu tiun?“

En la originalo, tiu ĉi frazo estas deklara frazo, anstataŭ demando. Do eble tiel:

„Mi tial kaptu kaj mortigu tiun.“

Pri „ĉarpentisto“

En la originalo, antaŭ tiu „ĉarpentisto“ troviĝas la priskriba vorto „*da*“ (fonetike) „lerta“. Vd. ĉe Wang Chongfang:

„Tiu, kiu prenas la hakilon  
anstataŭ la ĉarpentisto,  
malofte elturniĝas  
sen vundi siajn manojn.“

La traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„El tiuj, kiuj hakas lignon anstataŭ lertaj arpentistoj,  
Preskau neniu evitas vundi siajn manojn.“

## 75

La popolo malsatas,  
ĉar la superuloj voras tro da impostoj;  
tial ĝi malsatas.

La popolo regeblas malfacile tial,  
ĉar la superuloj tro multe agas;  
tial ĝi regeblas malfacile.

La popolo akceptas la morton tro facilanime.  
ĉar la superuloj tro abunde serĉas la vivplenecon,  
tial la popolo akceptas la morton tro facilanime.  
Sed tiu, kiu ne tro agas por la vivo,  
estas pli bone ol tiu, al kiu la vivo estas tro kara.



## **Rimarkoj pri 75**

### **Rimarkoj de Anniespera**

Vilhelmo:

„Sed tiu, kiu ne tro agas por la vivo,  
estas pli bone ol tiu, al kiu la vivo estas tro kara.“

Pri tiuj ĉi frazoj en Ĉinio la ĝenerala opinio estas tia, kia  
tradukis ĝin Wang Chongfang:

„Estas pli saĝaj ol tiuj, kiuj tro ŝatas sian vivon.“

### **Rimarkoj de Cezar**

Tiu ĉapitro esprimas malnovan tutmondan plendon, kiu  
tute validas ĝis nun. La regantoj tro pensas pri si mem, kaj  
malpli pri la bonfarto de „sia“ popolo. Ekzemple la rusa  
prezidanto, al kiu la olimpika ideo valoras la gigantan  
sumon de 50 miliardoj da eŭroj. Mi povas imagi, ke multaj  
rusoj pensas alie pri tio, ke ili volus uzi la monon por pli  
gravaj aferoj.

## 76

La homo, kiu komencas vivi,  
estas mola kaj malforta,  
kaj kiam homo mortas,  
tiu homo estas dura kaj forta.

La plantoj, kiuj komencas vivi,  
estas molaj kaj delikataj,  
kaj kiam ili mortas, magraj kaj rigidaj.

Tial la malmoluloj kaj fortuloj  
estas kunuloj de l' morto,  
kaj la moluloj kaj malfortuloj  
kunuloj de l' vivo.

El tio sekvas:

Se la armiloj estas fortaj, ili ne venkas.

Se la arboj estas fortaj, oni dehakas ilin.

La granda kaj forta estas sube.

La mola kaj malforta supre.

## **Rimarkoj pri 76**

### **Rimarko de Anniespera**

Laŭ mi, Se la arboj estas fortaj, ili estos dehakitaj ne nur de homoj, sed ankaŭ rompiĝos de forta vento ks., ĉu ne?

Vd. de Wang Chongfang:

„Kaj la arbo, kreskinte forta, rompiĝos.“

### **Rimarkoj de Cezar**

Denove montriĝas, ke Laocio estis dialektiva filozofo, ankaŭ la leĝo pri la subita transformiĝo de amasigita kvanto en novan kvaliton nerekte estas jam priskribita en la ĉapitro. Fortaj armiloj estas por Laocio, tute laŭ ties pacifisma sinteno, malbonaŭguriloj: Krome, leganto, pripensu mem: kiu estas pli forta, pli eltenema, la kamparano aŭ la militisto? Sen kamparanoj la militistoj devus malsatmorti. Sed la senarmilaj kamparanoj povus vivi sen la militistoj, kiuj nur povas detrui, ne krei ion, ne nutri sin. Do, pli vivkapabla estas la senarmila kamparano, ĉar oni bezonas lin ĉiam, la militiston oni bezonas nur por detrui ion, por

regi perforte.

## 77

La Taŭo de la ĉielo, kiom ĝi similas al la streĉanto de  
pafarko!

La altan li premas malsupren,  
la suban li altigas;  
tio, kio ne havas sufiĉe, li kompletigas.

La Taŭo de la ĉielo estas  
malpliigi tion, kio havas tro  
kaj tion, kio havas maltro pliigi.

La Taŭo de la homoj ne estas tia.  
Ĝi malpliigas tion, kio ne havas sufiĉe  
por oferi ĝin al tiu, kiu havas tro.

Sed kiu estas kapabla, tion,  
kion li havas tro oferi al la mondo?  
Nur tiu, kiu havas la TAŬON.

Tiel agas ankaŭ la saĝulo:  
Li agas kaj ne retenas ion.  
Se la verko estas kreita, li ne restadas ĉe ĝi.

Li ne deziras montri sian gravecon antaŭ aliaj.

## **Rimarkoj pri 77**

### **Rimarko de Anniespera**

Vilhelmo:

„Sed kiu estas kapabla, tion,  
kion li havas tro oferti al la mondo?“

Pri tiu ĉi frazo, mia opinie la traduko de Wang Chongfang  
estas pli preciza:

„Kiu do povas doni el la pli-ol-sufiĉo al la mondo?“

## 78

Tutmonde ne ekzistas io,  
kio estas pli softa kaj pli malforta ol la akvo.  
Kaj tamen, laŭ la maniero kiel ĝi atakas la duran,  
nenio supereblas ĝin.  
Ĝi ŝanĝeblas per nenio.  
Ke la mola venkas la duran,  
scias ĉiu surtere,  
sed neniuj kapablas agi laŭ tio.

Tiel diris ankaŭ saĝulo:  
„Tiu, kiu prenas la koton de la tero sur sin,  
estas la mastro dum ter-oferado.  
Tiu, kiu prenas la malfeliĉon de la regno sur sin,  
estas la reĝo del' mondo.“  
Veraj vortoj estas kvazaŭ malaj.



## Rimarkoj pri 78

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„Ĝi ŝanĝeblas per nenio.“

Pri tiu ĉi frazo, en Ĉinio la komuna kompreno estas tia, kia  
*la* traduko de Wang Chongfang:

„nenio povas ĝin anstataŭi.“

Vilhelmo:

„Ke la mola venkas la duran,“

Ĉi tie mankas frazo. Vd. de Wang Chongfang:

„ke la malforta povas venki la fortan

Kaj la mola povas venki la malmolan,“

„Tiu, kiu prenas la koton de la tero sur sin,  
estas la mastro dum ter-oferado.“

Pri „ter-oferado“: En la teksto ekzistas tiuj ĉi vortoj „*she ji*“  
(fonetike), kiuj signifas „regno“, anstataŭ „ter-oferado“.

Kaj pri tiu frazo, eble la traduko (laŭsence) de Wang Chongfang estas pli facile komprenebla:

„Tiu, kiu portas sur si la humiliĝon de la tuta regno, Povas esti ĝia suvereno.“

### **Rimarko de Cezar**

La tuta ĉapitro memoras min tre pri devizoj de Jesuo Kristo. Pensoj el la montprediko de Jesuo en tiu ĉapitro kavzaŭ jam estas formulitaj. Oni scias tutmonde, ke la novplatonaj filozofoj influis la kristanisman, sed ĉu oni scias ĝenerale, ke jam Laocio esprimis nekutimajn pensojn en la maniero de Jesuo? Certe ne. Ankaŭ la verkistoj B.Traven aŭ Tolstoj post Laocio cerbumis pri tio, kiu estas efektive la reĝo de l' mondo, kaj ankaŭ ili prezentis nekutimajn rezultojn.

## 79

Se oni repacigas du furiozajn kverelegantojn  
kaj tamen postrestus ankoraŭ kverelo,  
kiel tio povus esti bona?

Tial la saĝulo agas laŭ sia devo  
kaj postulas nenion de aliaj.

Tial tiu, kiu havas VIVON,  
agas laŭ sia devo;  
sed tiu, kiu ne havas vivon,  
agas laŭ sia rajto.

## Rimarkoj pri 79

### Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„Tial tiu, kiu havas VIVON,  
agaz laŭ sia devo;  
sed tiu, kiu ne havas vivon,  
agaz laŭ sia rajto.“

Tiujn frazojn en Ĉinio plejmulte oni komprenas tiel, kiel redonas ilin la traduko de Wang Chongfang:

„La homo kun la VIRTO estas nepostulema kiel tenanto de ŝuldatesta stampo;

La homo sen la Virto estas kalkulema kiel la kolektanto de rentoj.“

Denove mankas frazoj. Mankas eble la plej gravaj frazoj de ĉi tiu teksto! Vd. de Wang Chongfang:

„La Taŭo de la ĉielo, kiu estas partia al neniuj,  
Ĉiam helpas la bonajn homojn.“

## **Rimarko de Cezar**

La unua rimarko de Anniespera memoras min pri mondfama poemo de la poeto Frederiko Ŝiler: „Al la ĝojo“ – konata antaŭ ĉio pro la verva muziko de Beeethoven – en kiu fakte ripetiĝas postuloj de Laocio. Mi citas nur la koncernatan tekstparton de la poemo. La poemo mem tradukis Kaloĉaj.

## **Friederiko Ŝilero**

### **Al la ĝojo**

Ĥoro:

Ho, toleron, paciencon,  
fratoj, por pli bona mond'!  
Donos super stela rond'  
granda Dio rekompencn!

Ĥu pripagi diojn? Vanto!  
Ĥu simili? Bela pen'!  
Venu ĝoji kun ĝojanto  
la mizero, la ĉagren'.

Venĝ'? Kolerero? En forgeson!

Jen pardon' al malamik'!

Liaj larmoj havu ĉeson,

lin ne boru pento-pik'.

Ĥoro:

En ŝuldroj plu nenio!

Mondon regu harmoni'!

Fratoj! Kiel juĝis vi,

tiel juĝos pri vi Dio!

(nekompleta redono)

Mi ne povas imagi, ke Ŝilero tute ne konis la faman tekston.

Tio estas pruvo, kiom profunde la pensado de Laocio jam en

la kleriga tempo de la germanaj „nanoŝtatoj“ influis la

verkistojn. Krome mi jam en alia loko menciis, kiom forte

influis la pensado de Laocio la pensadon de la unuaj

kristanoj. Sed tiu fonto por la kristanismo inter kristanoj ne

estas tiel konata kiel ĝi meritis tion.

## 80

Lando estu malgranda

kaj ties loĝantoj malmultaj.

Ilojn, kiuj plimultigus la fortojn de la homoj,

oni ne uzu.

Oni faru, ke la popolo konsideru grava la morton

kaj ne vojaĝu malproksimen.

Kvankam estas ŝipoj kaj ĉaroj,

estu neniuj, kiu veturigu ilin.

Kvankam estas kiraso kaj armiloj,

estu neniuj, kiu ekuzu ilin.

Oni faru, ke la popolo ree nodu ŝnurojn

kaj ilin uzu anstataŭ la skribo.

Oni faru dolĉa iliajn manĝojn

kaj bela iliajn vestojn,

pacaj iliajn loĝejojn,

kaj ĝojaj ties morojn.

Eĉ, se najbaraj landoj troviĝus

en viddistanco, tiel,  
ke reciproke oni povus aŭdi  
la vokon de la kokoj kaj hundoj,  
la homoj tamen mortu en la plej granda aĝo  
sen tio, ke ili vojaĝis tien kaj reen.



## **Rimarkoj pri 80**

### **Rimarkoj de Annieespera**

Vilhelmo:

„Oni faru, ke la popolo konsideru grava la morton.“

En Ĉinio plej multaj homoj komprenas ĝin tiel, kiel en la traduko de Wang Chongfang:

„La popolo ne risku sian vivon“

Vilhelmo:

„la homoj tamen mortu en la plej granda aĝo sen tio, ke ili vojaĝis tien kaj reen“

Pri tiu ĉi frazo, laŭ mi, la traduko de Wang Chongfang estas pli fidela kaj konciza:

„Tamen ili neniam vizitus unu alian ĝis ili mortus de maljuneco.“

### **Rimarkoj de Cezar**

Bela penso estas, ke oni, havante armilojn kaj kirasojn,

tamen kiel eble plej malmulte uzu ilin. Goeto uzis tiun pacigan penson por poemo, en kiu erinaco fakte estas armito, sed samtempe pacoheroo.

Interesa afero estas, ke la ĉinoj en certa historia periodo efektive rezignis pri tio sendi plu esploristajn ŝipojn en nekonatajn landojn, kvankam ili havis bonegajn ŝipojn, kiuj tiujn en Eŭropo eĉ superatutis. Ankaŭ la ĉina muro estas indiko pri tia pensado, kies celo unuavice certe estis enfermi kaj konservi tion, kion oni jam havas anstataŭ serĉi novajn aventurojn.

### **Rimarko de Anniespera**

Jes, sed tio okazis pli poste ol en la periodo de Laocio. En la tempo de Laocio tio nur estis lia revata lando. ^\_^

## 81

Veraj vortoj ne estas belaj,

belaj vortoj ne estas veraj.

Kapablulo ne persvadas iun.

Persvadulo ne kapablas.

La saĝulo ne estas instruita,

la instruito ne estas saĝa.

La saĝulo ne suramasigas posedon

Ju pli li agas por aliaj,

des pli li posedas.

Ju pli li donas al aliaj,

des pli li havas.

La TAŬO de l' ĈIELO

estas stimuli sen damaĝi.

La TAŬO de l' saĝulo

estas agi sen konkuri.

# Rimarkoj pri 81

## Rimarkoj de Anniespera

Vilhelmo:

„Kapablulo ne persvadas iun.

Persvadulo ne kapablas.“

En la originalo ekzistas vorto „*shan*“ (fonetike), kiu signifas „bona“, anstataŭ „kapabla.“ Vd. de Wang Chongfang:

„La bona homo ne estas elokventa,

„La saĝulo ne estas instruita,

la instruito ne estas saĝa.“

En Ĉinio plej multaj homoj komprenas ilin tia, kia la traduko de Wang Chongfang:

„Tiu, kiu multe scias, ne elmontras sian erudicion,

Tiu, kiu penas elmontri sian erudicion, ne multe scias.“

**F i n o**